

Tiam mi iris al mia loĝejo. La Koretinjo ne tieis. Ŝi estis lasinta noton, per kiu ŝi sciigis min, ke ŝi, ĉar mi ne estis ĝustatempe reveninta, estis irinta al Tatela-sata, kunprenante la manuskriptojn. Vakon laŭtleĝus, mi sed devis postveni.

VENKO

Alveninte en la loĝejo de la ‚Tenanto‘, mi iris ĝis lia dormĉambro. En la najbara pasiflora ĉambro estis ĉi momente silente. Tial mi malfermis la pordon nur mal-laŭte. Ĝus kiam mi faris tion, eksonis la voĉo de Old Surehand:

„Jes, verece, li estis pli grande, multe pli grande ol ni ĉiuj! Multe pli grande ol ni ĉiuj pensis!“

„Kaj post tio ĉiam estiĝis pli kaj pli grande, sen ke ni rimarkis tion!“ Apanatŝka aligis.

„Kio nun estas pri via bildo?“ demandis Atabaska.

„Estas tro malgranda, multe tro malgranda por ni, ajn kiel grande ni konstruus ĝin!“ Kolma-puŝi elvokis.

Kaj Aŝta, la patrino, aligis:

„Ni ne volas bildon el ŝtono! Ni volas lin mem, lin mem en niaj koroj! La plej delikataj vortoj, kiujn li ĝus parolis al ni, per ke ili estis legitaj al ni, eksonu en la animo de nia nacio, ĉiam kaj ĉiam plu, eterne!“

Tiam oni vidis min en la malfermita pordo.

„Vi venas je la ĝusta tempo!“ Tatela-sata salutis min. „Ni faras paŭzon, ni ne povis plu, ni estis tro profunde kortuŝitaj; ni legis lian priskribon pri via venko je li, kaj tiam pri la venko je ĉiuj ĉefoj de la apaĉoj. Lia granda reenturniĝo de la militeca pensado al la paceca pensado, de malamo al amo, de la venĝo al pardono. Tio levis nin ĉiujn. Tio malfermis la kurtenon. Nun ni vidas, kio estas malantaŭ ĝi kaj malantaŭ niaj etaj agoj. Tio interne skuis eĉ Old Surehand:on, Apanatŝka:n kaj iliajn du filojn —“

„Ne skuis interne“, Young Apanatŝka eniĝis, „sed vidigis, kvankam ankaŭ ne jam tute. Vualo falis. Ĉu la alia ankaŭ falos iam, tion ni ne scias. Oni diras al ni, ke nia arto estus supraĵe, arto sen animo kaj pensoj, tute kiel nia bildo. Ni estis invitintaj vin esti niaj gastoj morgaŭ ĉe la akvofalo. Tie ni provos vivigi la ŝtonon per lumo. Se sukcesos, nu bone; se ne sukcesos —“

„Sukcesos!“ Young Surehand venkocerte interrompis lin.

Mi vidis, ke kelkaj volis rekte kontraŭi al li, tiam mi rapide ekparolis:

„Ni atendu tion!“

„Jes, ni atendu tion!“ Atabaska konsentis pri mi. „Sed eĉ se sukcesos, estus nur vivigita *rowdy*, kiun ni ekvidus, *rowdy* pretiĝanta pro atako, kun la revolvero en la mano. Sed jen tie ĉi oni havas alian, veran Winnetou:n, kiu posedas menson, karakteron kaj noblecon, kaj postulas menson, karakteron kaj noblecon de ni. Same kiel li ankaŭ ni strebu supren, ni, lia tuta raso. Li kunprenas nin, li fakte tiris nin supren.“

Dum li diris tion, li montris al la portreto de Winnetou, kiun ni estis donintaj al Tatela-sata. Tiu estis fiksiginta ĝin sur la blankan pasifloran krucon kaj stariginta je ambaŭ flankoj la bildojn de Mara Durimê kaj Abu Kital, la perfortemulo. Tio estis, kiam la ĉeestintoj venis kaj vidis ĝin, farinta grandan, profundan impreson, kaj tiu impresado tute necese kunkaŭzis, ke la hodiaŭa legado estis efikiginta tiel eksternorman kortuŝon. Fakte endis esti legata plu; sed nun oni foje estis haltinta, kaj ne vere reatingis la necesan internan trankvilecon. Tial Old Surehand proponis hodiaŭ ĉesi, ankaŭ ĉar por li ankoraŭ multaj aĵoj devis esti pretigataj por la morgaŭa grava tago. Oni akceptis tion. Post tio ĉiuj foriĝis, nur mi restis kun la Koretinjo ĉe Tatela-sata.

„Estis granda venko hodiaŭ“, la maljuna medicinisto diris. „Kiam ili venis kaj vidis vian al la morto strebantantan Winnetou:n, la sorto de la ŝtona bildo ekestis certa. Eĉ la du junaj artistoj kune kun iliaj patroj kaj Kolma-puŝi ne povas deteniĝi de tio. Kaj ili honestas. Ili ne malkonfesas tion. Ili provos morgaŭ ĉe la akvofalo savi ilian ideon, sed ili sentas jam hodiaŭ nur bone, ke eĉ ilia tre ega peno vanos. Vi rajdis kun Pappermann al la ŝtonminejoj. Vi revenis tiel malfrue. Tio supozigas, ke vi ne elrajdis vane.“

„Tute jes“, mi respondis. „La rezulto estas pli ol kontentiga, kvankam ne ĝojiga. Ni eksciis tre multe; ekzemple, ke la du medicinistoj de la kajovajoj kaj de la komanĉoj estis fuĝintaj.“

„Uf, uf!“ li elvokis ektimigite.

La Koretinjo ne malpli estis surprizigita. Mi pluis:

„Tio ne jam estas la plej malbona aĵo. Sekvas eĉ pli malbona. Mi rakontas.“

Mi raportis, kion mi devis raportiti. Kiam mi finiĝis, Tatela-sata diris:

„Mi certe estus en ekscitita aflikto, kiam mi ne vidus, ke vi tiel trankvilas! Kial vi ne rakontis tion, kiam la ĉefoj ankoraŭ ĉi tieis?“

„Ĉu ili devis scii tion? Ĉu ni bezonas ilin?“ mi demandis. „Kutime mi ne konfidas tion, kion mi povas fari sole, al tute neniu.“

„Vi pensas, ke vi saviĝos sole?“

„Jes.“

„Antaŭ ĉiuj tiuj kvarmil malamikoj, ĉu?“

„Jes.“

Li vidis al mi per grandaj okuloj, skuis la kapon kaj pluis:

„Nun mi komprenas pri Winnetou, kion mi tiutempe, kiam li ankoraŭ vivis, ne povis kompreni, fakte lian nepriskribeblan fidon pri vi. Hodiaŭ mi sentas ĝin mem, tiun fidon. Kaj nu diru: Kion vi volas fari kontraŭ ĉi ĉio, kio minacas al ni?“

„La plej simplan aĵon, kio ekzistas: Mi baras al ili la vojon tra la kavo! Tiam mi enŝlosas ilin en la ‚Valo de la Kavo‘, ĝis ili devos per famo petegi pri kompatado. Kaj mi prenos iliajn ĉefojn en kaptitecon, pro uzi ilin kiel garantiuloj. Kiom armitaj Winnetou:oj estas uzeblaj al vi?“

„Hodiaŭ pli ol tricent; ĝis morgaŭ vespere povos esti kvincent kaj pli poste eĉ multe pli.“

„Tio estas pli ol sufiĉe. Nun mi bezonas eble nur dudek da ili, kaj kune nian lojalan Intŝu-inta:n. Mi nun iras en la domon pro vestoŝanĝi, ĉar mi ankoraŭ surhavas la

indianajn vestaĵojn. Tiam mi revenos kaj grimpos malsupren kun ili tra la kaŝita ŝtuparo en la kavon, pro restarigi la stalaktitojn tiel, ke la du medicinistoj, kiam ili venos kun iliaj aroj, ne povas plutrovi la vojon.“

„Sed kio, se ili tamen trovos la vojon, kiun vi volas kaŝi antaŭ ili? Se ili same forŝovos la ŝtonojn, kiel vi forigis ilin, ĉu?“

„Tio povus okazi maksimume ĉe la vasta vojo, kies eliron malantaŭ la vuala falo mi sed baras al ili tiel, ke ili ne povos eliri. Per tio ĉio estas pretigita por hodiaŭ kaj morgaŭ. Pro la enŝlosado la malamikoj en la valo, pro tio ankaŭ postmorgaŭ estos tempo.“

Post tio mi ekiĝis foriri; sed endis al la Koretino fari ion alian antaŭe. Fakte ŝi petis al la ‚Tenanto de la Granda Medicino‘ pri la permeso rajti fotografi lin morgaŭ. Mi preskaŭ ektimiĝis. Tio estis aŭdacaĵo, kiun mi neniam estus permesinta al mi. Li sed ridetis bonkore kaj demandis:

„Ĉu mi rajtas demandi, pro kiu aŭ pro kio tiu bildo estu?“

„Estas sekreto“, ŝi respondis per malaltigita riskemo. „Sed kara, bona kaj tre utila sekreto, kiu faros grandan ĝojon al multaj, multaj homoj.“

„Tiukaze neblas al mi malakcepti la ‚karan, bonan kaj utilan‘ deziron de la *squam* de mia frato Shatterhand. Ŝi venu, ajn kiam ŝi volos; mi pretos.“

Kiam ni foriris post tio, mi demandis ŝin survoje, pro kio ŝi nu bezonis la fotografi-aĵon. Ŝi respondis:

„Diru, kiu tie ĉi je la Mount Winnetou estas la aŭtoritata persono: ĉu vi aŭ Tatela-sata?“

„Tute memkompreneble li!“

„Bone! Li kontentiĝis per demandi, sen ricevi respondon. Ĉu vi postulas pli ol li?“

„Jes.“

„Per kiu rajto?“

„Diru, kiu estas en nia geedzeco la aŭtoritata persono, ĉu mi aŭ Tatela-sata?“

„Tute memkompreneble li!“ ŝi ridis.

„*Well!* Do mi kontentiĝu! Mi estas venkita! Vi povas teni la sekreton!“

„Kaj mi nun kungrimpos malsupren en la kavon.“

„Ne.“

„Kial ne?“

„Unue vi estas tie malsupre ne utila ilo, kaj due mi nun ne plu estas sufiĉe aŭtoritata pro plenumi tiun deziron al vi. Mi povas plu fari nenion, sed diri al vi ‚bonan nokton‘.“

„Tio humiligas min ege! Vi sciu, mi pli ŝate malkaŝos mian fotografian sekreton al vi kaj rajtas tiam akompani vin. Ĉar mi ĉiukaze vane povos ekdormi, kiam mi scias, ke vi estas tie malsupre.“

„Bone! Konsentite! Ĉu nu? La sekreto, ĉu?“

„Mi volas la bildon de nia maljuna, fama amiko por la projekciilo.“

„En kia maniero?“

„Hodiaŭ vespere ja aperu la bildoj de la du artistoj je ambaŭ flankoj de la akvofalo. Mi havas la saman ideon pri nia suprenstrebanta Winnetou kun la bildoj de Tatela-sata kaj Mara Durimê je ambaŭ flankoj. Kion vi diras pri tio?“

„La ideo bonas, tre bonas. Vi tiukaze bezonas diversajn aparatojn, diversajn lensojn —“

„Tieas, ĉio tieas!“ ŝi rapide enigis.

„Kie?“

„Ĉe la inĝeniero, kun kiu mi jam estas parolinta.“

„Vi pensas, ke li faros tion, ĉu?“

„Kun plezuro!“

„Kaj ne malkaŝos ion antaŭtempe, ĉu?“

„Certe ne! Mi garantias!“

„Tiukaze mi konsentas.“

„Kaj ĉu vi nun kunprenas min en la kavon?“

„Jes. Mi ja nu estas devigita fari ĉion, kion vi ordonas!“

Kiam ni revenis post kelka tempo al Tatela-sata, Intŝu-inta jam staris prete kun siaj dudek viroj. Ili sufiĉe estis proviziĝintaj per torĉoj kaj kelkaj iloj. Ni malfermis la ŝtuparan ŝtonon kaj iĝis en la koridoron, kiu kondukis nin malsupren. Tie alveninte, ni unue iris al la loko, je kiu la malvasta vojo defklaniĝis de la vasta. Tie ni estis kreintaj spacon per la forigon de la stalaktitoj. Ili estis realportataj kaj metataj en ilian eksan pozicion. Ni ankaŭ alportis amason da alia pecoj, kiujn ni aranĝis tiel, ke la maskiteco de la vojo neeble plu povis esti ekkonata. La koridoro estis plenigita komplete de supre ĝis malsupre, fakte en tia laŭnatura maniero, ke la penso de homfarita posthelpo ŝajnis ekskludebligita.

Dum tiu laboro mi esploris la lokon, kiu jam antaŭe estis ŝajninta al mi okulfrape. El tiu unu fendo en la plafono estis estiĝintaj pluraj. Sur la tero jam kuŝis tuta amaso da malsuprenfalintaj ŝtoneroj. Kaj vera pluvo da disfrotigitaj kalksintro kribume falis senĉese malsupren el la oscedaj fendoj. Intertempe oni aŭdis mallaŭtan, sed akran brueton, kvazaŭ estis frotantaj du vitraj supraĵoj unu al la aliaj. Tio sonis horore. Tie kaj tie sonis ie, kien oni ne povis vidi, kvazaŭ rokoj kraketis kaj ŝtonoj falis el la alteco en la profundon. Tio kaŭzis tiel necertigan, timigan senton. Mi treege devis venki subigi min pro povi resti trankvile je tiu loko. Mi havis senĉesan zorgon subite esti frakasata, kaj ĝojis, kiam nia laboro finfine estis farita, kaj ni povis foriĝi. Kaj tio rilatis ne nur mi sole, sed la Koretinjo diris, kiam ni foriris:

„Dank’ al Dio, ke tio estis pasinta! Dum la lasta tempo mi fartis tute timplene.“

„Kial?“ mi demandis.

„Ĉar ŝajnas, kvazaŭ ĉio devus disfali tie ĉi!“

„Ĉu vi ankaŭ havis tiun senton?“

„Jam tuj, kiam ni venis. Mi diris nenion, pro ne maltrankviligi vin. Kio estas tie ĉi super ni?“

„Plej verŝajne la peza Winnetou-figuro. Almenaŭ mi pensas tion. Mi ne povas diri tion ekzakte.“

Tiam ŝi ekkriis:

„Aŭdu, ĝi enfalas!“

„Silentu, silentu! Ne lasu aŭdi tion neniun homon!“

„Do tial ĝi staras ĉiam kaj ĉiam pli malrekte, ĉu?“

„Ĉu vi pensas, ke tiu katastrofo estas eble?“

„Preskaŭ neeviteblas!“

„Kiam?“

„La tempo ne difineblas. Pro kapabli tion, oni detale ekzameni la rokan bazon. Sed mi esperas, ke ne okazos nur pli poste, ne dum la sekvontaj tagoj.“

Se mi estus sciinta, kiel proksime tiu hororiga okazo estis, tiukaze nenio estus detenebliginta min averti la ekspektendajn kvarmil indianojn. Ni nun iris reen laŭ la malvasta vojo ĝis la loko, kie deflankiĝis la kruta vojo al la Diabla Katedro. Ankaŭ tiun deflankiĝon ni tiel maskiĝis kaj baris, ke neniu povis serĉi kaŝan devojon de tie ĉi. De tie ni iris plu supren ĝis tie, kie komenciĝis la suprengrimpejo al la pasiflora ĉambro. Ni baris ĝin same prizorge, sed ne de malsupre, sed de supre malsupren, ĉar ni ja devis esti malantaŭ la barilo pro povi reeniri al la kastelo. Kiam ni alvenis tie, jam la mateno preskaŭ krepuskis. Tatela-sata ne tieis. Ni fermis la sekretan pordon kaj tiam disiĝis de niaj indianaj akompanantoj pro iri hejmen kaj dormi almenaŭ malmultajn horojn.

Kiam ni vekigis, Intŝu-inta jam atendis nin pro anonci al ni, ke la fratoj Enters tieis jam kelkajn horojn kaj deziris paroli kun ni. Ni lasis ilin veni kaj akceptis ilin amikece. Ili kondukis konsternite. Ili ne sciis, kiel ili devis komenci. Jen mi faciligis ĝin al ili per la demando:

„Vi venis pro diri al ni, ke ni ekmortu hodiaŭ vespere, ĉu?“

Nun ili ektimis; sed mi trankvile pluis:

„La du medicinistoj forfuĝis. Ili volas konduki la kvarmil malamikojn tra la kavo hodiaŭ vespere pro ataki nin. La laboristoj staros prete sub la regado de la ‚Nigger‘ pro kunagi kun ili. La ruĝuloj donos, kiam ili estos alvenintaj malantaŭ la akvofalo la signon per pafo. Tuj kiam tiu pafo estos farita, la fratoj Enters murdu min kaj mian edzinon, kaj la laboristoj atakos la ĉefojn kaj la aliajn amikojn de ni!“

Ili rigardis al mi fikse kaj silente. Ili unue diris neniun vorton, tiel ege estis ilia miriĝo.

„Nu ĉu?“ demandis la Koretinjo. „Kiel tio plaĉas al Vi? Ĉu Vi konfesas tion? Aŭ ĉu Vi volas malkonfesi ĝin?“

Jen Sebulon respondis:

„Ĉu malkonfesi? Ne! Ni ja nur venis pro diri tion al Vi, pro averti Vin! Ni nur estas tiel konsternite, ĉar Vi jam scias ĉion. Kaj tiel detale! Ĝi ja devas esti la plej ega sekreto!“

„Ĉu sekreto? *Pshaw!*“ mi enigis. „Ni ĉiam estis sciintaj ĉion ĝustatempe, fakte multe pli bone ol Vi. Tion Vi certe nun finfine komprenis! Kaj tiel ni scias ankaŭ tion. Ni eĉ scias, ke Vi decidis hieraŭ vespere en la manĝejo, kiam Tusaga-saritŝ kaj To-kaj-tŝun estis foririntaj, veni hodiaŭ frue kaj rakonti ĉion al ni.“

„Kiel tio eblas? Vi ja ne povis esti estinta sub la tabloj aŭ seĝoj!“

„Ho ne! Tiel nekomforte ni ne bezonas ĝin fari al ni! La homoj, kiuj ŝajnas esti niaj malamikoj, rakontis ĝin mem al ni. Ĝojiĝu, ke Vi estas serioze al ni! Ĉar se tio ne estus la kazo, vi estus hodiaŭ vespere la unuaj, kiuj ekmortos per niaj kugloj.“

„Ho, kio rilatas tion, ni ja verŝajne tute ne ĉagreniĝus pri tio, ke ni estos mortaj morgaŭ! Al ne estas nek feliĉo nek stelo. Tio estas la malbeno, kiu herediĝas de la patro al la filoj.“

„Ne la malbeno, sed la beno!“ mi kontraŭis al li.

„Kial?“ li demandis.

„La beno povi rebonigi okazintaĵojn, kaj per tio redempti la patron.“

„Kaj al tio Vi kredas, *Mr. Shatterhand*?“

„Jes.“

„Ĉu vere? Ĉu vere? Mi petas Vin, diru ĝin sincere al mi!“

„Certe kaj vere!“

„Dank’ al Dio! Do estas malgraŭ ĉio celo al ni! Ni volas elteni ĝin plu! Vi do nun scias, ke ni estis ordonitaj iĝi nin en Vian proksimon hodiaŭ vespere?“

„Jes.“

„Ĉu Vi volas permesi tion al ni?“

„Ŝate.“

„Kaj tamen ne malfidi pri ni?“

„Ni estas konvinkitaj, ke Vi havas honestan intencon.“

„Dio benu Vin pro tiu vorto! Ĉu Vi havas ian ordonon por ni?“

„Ne jam nun. Eble hodiaŭ vespere. Verŝajne interbatalo ne okaziĝos. La atako estos evitata ĉiukaze.“

„Sed gardiĝu, okazu kio volas, antaŭ la *„Nigger“*. Li malamas Vin arde. Li pensas, ke ĉio estas Via kulpo. Kiam li ekhavas la elekton doni unu kuglon al Vi aŭ neniun, tiam li certe donos al Vi du! Nun ni iru. Ni estis atendintaj jam tiel longe, kaj tamen neniu sciu, ke ni frekventas tie ĉi.“

Ili foriĝis.

„Mi bedaŭras ilin, senfine bedaŭras!“ diris la Koretinjo. „Ili estas tute alie kiel antaŭe. Mi dezirus, ke ili havus sufiĉe feliĉan vivon antaŭ ili!“

Kiam ni tiam sidis pro trinki nian prokrastitan kafon, alvenis du aliaj personoj, kiuj volis viziti nin. Tiuj estis la *squaw* de la ĉefo Pida kaj „Malhela Haro“, ŝia fratino. Ili memkompreneble estis akceptataj en la plej elkora maniero. La Koretinjo tuj denove faris kafon pro lasi ilin partopreni en nia matenmanĝo. Ni eksciis de ili, ke hieraŭ vespere la virinoj de la komanĉoj kaj de la kajovajoj estis alvenintaj. Ili tuj estis kuniĝintaj kun la virinoj de la suoj sub iliaj estrino Aŝta, pro valorigi ankaŭ ilian voĉon dum la monumentaj interkonsiladoj. Hodiaŭ frue ili ĉiuj estis irintaj al la konstruaĵo, kie la du junaj artistoj eksponis ilian rondpentraĵon kaj la modelon de la Winnetou-figuro. Ili estis forlasintaj ĝin tute elrevigite. Kio tie estis montrita al ili, havis neniun rilaton al la bonega Winnetou, kiun oni amas kaj estimas, ajn kie for la langoj de la ruĝaj popoloj sonas. Ne! La Winnetou:n, kiun ili estis vidintaj tie, ili rifuzis. Tiun ili ne volis havi. Kaj pro tuj diri tion al mi, ili estis venintaj.

Sed gravis doni al mi ankaŭ alian mesaĝon, kiu estis multe pli malfacila. Ili ne vere sciis, kion ili devis fari pro sufiĉe averti min, sen fari perfidon al iliaj propraj militistoj. Mi kuraĝigis ilin, klarigante, ke mi jam sciis ĉion. Mi diris al ili, ke la kvarmil militistoj hodiaŭ iros tra la granda kavo, pro efikigi la sensencan planon de la maljunaj, kontraŭ ni alianciĝintaj ĉefoj. Tio ebligis al ili esti sincere. Mi eksciis de ili, ke Pida, ilia edzo kaj bofrato, hodiaŭ frutempe estis rajdinta al la „Valo de la Kavoj“, ĉar oni estis elektinta lin

estri la subteran iradon. Nun la afero estis al ili tiel: Se li venkus, mi devis pereji, kaj se venkus mi, tio devis esti lia fino. En tiu koraflikto ili estis pensintaj, ke estus la plej bona aĵo viziti min kaj konfidiĝi al mi. Mi promesis prisilentecon kaj donis la certigon al ili, ke nek al mi nek al Pida okazus io malica. Kiam ili forlasis nin post kelka tempo, ili plene estis trankviligitaj.

Post tio la Koretinjo iris al Tatela-sata pro fotografi lin. Mi akompanis ŝin. Kiam la bildigo estis finiginta, ŝi forlasis nin. Urgis al ŝi iri al la inĝeniero. Ni sed faris promenadon al la gardoturo, pro viziti la „Junan Aglon“. Tiu ŝajnis esti sciiginta pri la veno de nia digna amiko kaj gardanto, ĉar li vokis al ni, kiam ni alvenis tie, de la alteco de sia tegmento:

„Venu supren! Ĉio pretas. Mia „Aglo“ estas finigita!“

Ni paŝis en la turon kaj grimpis supren laŭ la multaj ŝtupoj ĝis la ebena tegmento. Tie staris sur kvar gamboj granda, birdosimila konstruaĵo kun du korpoj, du etenditaj, grandegaj flugiloj kaj du vostoĵoj. La du korpoj unuiĝis antaŭe per iliaj koloj al unu kapo, al aglokapo. Ili estis plektitaj el plummalpeza, sed eksternorme firmaj junkoj. Kion ili enhavis, oni ne vidis, plej verŝajne la motoron. Krome la aparato konsistis el preskaŭ senpezaj ŝtofoj, kiuj sed estis nedisŝireblaj kaj posedis egan firmecon. La vostoĵoj estis formigitaj tre strange. Inter la korpojn estis muntita komforta seĝo, kiu donis spacon por du personoj. Tieis diversaj dratoj, kies funkciojn ne estis ekkoneblaj per la unua vido, sed oni povis pensi, ke ili servis pro la regado kaj kondukado de la granda birdo. Krom la „Juna Aglo“ ankaŭ ĉeestis nia maljuna Pappermann kaj Aŝta, la pli juna.

Ne estas permesata al mi doni priskribon de la aparato, sed mi povas aserti, ke, kiam la „Juna Aglo“ estis klarigita ĉion al ni, ni du, Tatela-sata kaj mi, estis tiel konviktaj pri la sekureco kaj la prifidindeco de la aparato, ke en ni tuj ekleviĝis la deziro foje rajti uzi ĝin sufiĉe baldaŭ.

„Kaj ĝi flugas, ĝi flugas!“ Pappermann asertis. „Mi vidis tion mem!“

„Kiam?“ mi demandis.

„Hodiaŭ frue“, li respondis, „kiam ĉiu ankoraŭ dormis, kaj estis nur la unua nuanco de la matena heliĝo. Ĉar nenio devis vidi ĝin. Mi venis supren pro helpi. La „Juna Aglo“ grimpis sur la seĝon kaj tiris draton. Tuj vigliĝis en la du korpoj. La birdo komencis spiri. Plua drato, kaj la vostoĵoj vastiĝis. La flugiloj moviĝis. Du, tri frapoj, kaj la birdo leviĝis, forlasis la tegmenton de la turo kaj elflugis kelkan distancon, alte super la ebenaĵo. Ĝi ĉiam kaj ĉiam pli altiĝis, faris kurbon, revenis reen kaj malleviĝis malrapide, sen ke estis bato malsupren sur la tegmenton. Ĝi ankoraŭ staras tie ekzakte, kiel ĝi alvenis!“

„Kaj tio veras, ĉu? Ĉu vere veras?“ mi demandis la „Junan Aglon“.

Li kapjesis al mi ridetante. Tiu rideto ne estis fiere, sed senfine feliĉe! Tatela-sata vidis de la tegmento al la foreco. Preskaŭ estis, kvazaŭ lia vizaĝo volis brili.

„Venu!“ eksonis el lia buŝo nur post pli longa tempo.

Li iris al la ŝtuparo pro regrimpi malsupren. Alveninte tien, li kondukis nin en la altaĵan arbaron. Li paŝis antaŭe; ni sekvis malantaŭe. Neniu parolis vorton. Li kondukis nin al la alia flanko de la monto, al loko, de kie ni povis vidi transe al la lago kaj malsupren al la vuala falo. Trans la lago altis la katedraleca ĉefmonto de la Mount Winne-

tou, kaj malantaŭ tiu estis videblaj la grandegaj pintoj de la najbaraj gigantaĵoj, inter ili unu, kiu altis sian pinton tiel fiere kaj tiel krute, tiel akre kaj orte, kvazaŭ estis neniam permesita al unu homa kreaĵo iĝi sur ĝin. Montrante al ĝi, la maljunulo diris:

„Tiu estas la ‚Monto de la Reĝotomboj‘. Antaŭ ke la raso de la indianoj dissolviĝis en etajn tribojn, ĝi estis regata ne de etaj ĉefoj, sed de fortaj imperiestroj kaj reĝoj, kiuj ĉiuj estas enterigitaj sur la grandega, alte super la nuboj situanta ebenaĵo de tiu monto. La tomboj estas faritaj el ŝtonoj. Kune ili formas mortulan urbon kun stratoj kaj plac-oj, sur kiuj ne estas nuanco da vivo aŭ moviĝo. Ili enhavas ne nur la korpojn de la mortiĝintaj estroj, sed en ĉiu tombo estas, teniĝinta nedetruite en oraj kestenoj, la libroj pri ĉiu jaro de la regado de tiu, kiu trovis tie sian lastan mondan loĝejon. Tie do ne nur estis entombigitaj ĉiuj la grandaj estroj de la ruĝa raso, sed ilia tuta historio kaj ĉuj dokumentoj kaj rakontaĵoj de ilia longa, multemiljara estinteco. Sed oni ne povas atingi ilin. Oni ne povas supreniri. Kiam ankaŭ la lasta reĝo estis entombigita, oni neigis la rokan straton, kiu kondukis supren al la reĝotomboj, tiel ke estis neeble al ĉiuj mortemuloj plu veni al ilin supren. Ja laŭdire estis kruta flankavoĵeto, kiu tiutempe ne estis kunneiginta, sed neniu trovis ĝin ĝis hodiaŭ. En unu el miaj plej malnovaj libroj estas skribita, ke la ŝlosilo al tiu voĵeto estus ekzistanta, sed ĝi estus alte supre sur la ‚Monto de la Medicino‘, ekzakte je la bazo de la lasta, plej alta rok-pinto, sub ŝtono, kiu havis la figuron de duona globo. La ‚Juna Aglo‘, kiun la ruĝaj viroj atendis jam dum longaj, longaj jaroj, flugos, kiel estis skribita sur la haŭto de la granda militaglo, tri fojojn ĉirkaŭ la monto kaj surteriĝi ĉe tiu ŝtono, pro levi ĝin kaj elpreni la ŝlosilon. Kiam tio estos sukcesinta, tiam la Monto de la Reĝotomboj estos surgrimpebla, kaj la rakontaĵoj kaj dokumentoj de la malaperintaj pratempoj rajtas laŭtigi iliajn voĉojn, pro malkaŝi la sekretojn de nia estinteco.“

Li suprenvidis al tiu rokpinglo, ĉe kies bazo la ŝlosilo laŭdire estis. Kaj li transvidis al la montaltaĵo, sur kiu estis entombitaj la ruĝaj imperiestroj kaj reĝoj. Tiam li pluis:

„Ĉi ĉion mi sciis. En mia brusto estis unuigita la tuta, arda sopiro de nia raso. Tiam mi sidis antaŭ mia pordo, kaj antaŭ miaj piedoj surteriĝis el altaj aeroj la riskema knabo, kiu estis deviginta la plej majestan el la birdoj, porti lin trans la abismoj de la morto sur la certan teron. Li de tiam estis nomata la ‚Juna Aglo‘. Ĉu li estis la promesito, la antaŭanoncito? Mi kredis ĝin. Mi prenis lin al mi. Mi edukis lin. Li estis parenco de mia Winnetou. Mi metis la sopiron povi flugi en lian koron. Kiam mi aŭdis, ke transe en Kalifornujo estis farataj la unuaj flugprovoj, mi decidis sendi lin al la palvizaĝoj, pro ke li lernu la flugadon de ili. Li iris kaj faris, kion mi volis de li. Nun li revenis. Li asertas estis estiĝinta flugisto. Li diris, ke li estis elpensinta propran aglon, pri kies flugiloj oni povis fidi. Mi kredas tion de li, ĉar li estas mia unua kaj plej eminenta Winnetou, kaj neniam estis veninta unu malvera vorto trans liaj lipoj. Tamen mi demandas lin hodiaŭ kaj nun, en tiu ĉi grava momento: Ĉu vi riskas, flugi tien supren kaj ekzameni, ĉu vere tieas ŝtono, sub kiu estas kaŝinta la ŝlosilo al la tomboj de la reĝoj?“

La ‚Juna Aglo‘ respondis tuj kaj per prifida sono:

„Mi ne nur riskas tion, sed eĉ estas facile, tre facile.“

„Kaj kiam vi povas fari tion?“

„Tuj kiam vi deziras ĝin. Nun aŭ pli poste. La tempo, kion vi difinos, estas egale al mi!“

„Tiukaze ne jam nun. La hodiaŭa tago koncentriĝu sian atenton al io alia. Sed mi dankas al vi pro via espereco. Ĝi firmigas min en mia kredo al la estonto! Ni malfermos la tombojn de la mortaj imperiestroj kaj reĝoj. Ni trovos la librojn kaj vekos la animon de nia raso, kiu restas en ili, el la miljara dormado. Ĝi kreskos kaj grandiĝos, kiel grandiĝis la aliaj rasoj, kaj neniu plu evitos, ke ni atingos la altaĵojn, kiuj estis difinitaj de Manitou al ni kiel loĝejoj!“

Nia vido sufiĉis, kiel jam dirita, de tie, kie ni troviĝis nun, ĝis malsupre al la vuala falo. Tie ni nun vidis la Koretinjon kun la inĝeniero kaj kelkaj indianoj, kiuj portis fotografiajn aparatojn. Ŝi do estis en tuta agado kaj gajnis, kiel ŝajnis, la inĝenieron pro ŝi. Ni sed reeniris al la turo kaj de tiu reen al la kastelo, kie mi estis surprizita per tio, ke mi trovis tie Old Surehand:on kaj Apanatŝkan atendante min.

„Ne miriĝu, ke Vi vidas nin ĉe Vi“, la unua ekparolis al mi. „Estas iom neklara, sed, laŭsajne, ege grava afero, kiu kondukis nin al Vi. Ĉu Vi konas la tiel nomatan ‚Nigger‘:on, kiu mastrumas la laboristan manĝejon?“

„Mi foje vidis lin“, mi respondis.

„Ĉu Vi parolis kun li?“

„Ne.“

„Do Vi ne ofendis lin, ĉu?“

„Neniam.“

„Tamen li sentas terurigan malamon pri Vi. Kial, tion Vi certe povas pensi. Li estas je nia flanko. Ni do ne povas koleri pri li. Sed li estas plej nepripensema, kolerema kaj perfortema homo kaj ŝajnas nun voli tro fore per sia malamo kontraŭ Vi. Li ĵus estis ĉe ni pro negocata afero kaj parolis je tiu okazo pri Vi en maniero, kiu igis nin en aflikton. Li diris, ke hodiaŭ estus Via lasta vivotago; ankaŭ aliaj devus pereji; hodiaŭ decidiĝu, kiu estus estro kaj mastro ĉe la Mount Winnetou. Li ŝajnis esti ebrie. Ĝis nun ni estis supozintaj lin esti lojale; sed tiuj esprimmanieroj kaŭzas nian pripensadon. Io ŝajnas esti survoje al Vi, sed ni bedaŭrinde ne povis ekscii, kion.“

„Mi dankas al Vi!“ mi respondis. „Mi jam estas avertita.“

„Ĉu vere? Tio ĝojigas nin! Vi ankoraŭ estas la tiutempa! Vi ĉiam scias pli ol ni! Do diru, ĉu nia supozo ĝustas? Ĉu oni planas ion kontraŭ Vi?“

„Ne nur kontraŭ mi, sed ankaŭ kontraŭ Vi.“

„Ĉu vere? Kion?“

„Oni volas neigi min kaj Vin, entute nin ĉiujn. Mi estas sciigita pri ĉio kaj ne volis paroli pri tio, ĝis ĉio estis pasinta. Sed ĉar Vi estas tiel honeste averti min, Vian kontraŭulon, mi do volas konfidiĝi al Vi.“

Mi rakontis al ili preskaŭ ĉion, kion mi sciis. La efiko facile penseblas. Ili tuj volis elrajdi kun ĉiuj viroj al la ‚Valo de la Kavoj‘, pro sekvi la malamikojn en la kavon kaj buĉi ilin ĉiujn en tie. Feliĉe mi ne estis sciiginta ion al ili pri la eco de la kavoj, kaj ke mi konis iliajn elirojn. Estis granda peno al mi trankviligi ilin kaj elpremi la promeson de ili, lasi la estradon de tiu afero sole kaj nure en miaj manoj. Sed unu aĵon mi ne povis

evitigi, fakte, ke ili tuj volis eliri al la manĝejo pro postuli klarecon de la „Nigger“ kaj maldanĝerigi lin. Per tio facile povis esti farata strekon tra ĉiuj miaj prikalkuladoj, kaj tial mi vole nevole devis rajdi kun ili, pro eviti almenaŭ tion, kio ankoraŭ estis eviteble.

Kiam ni preterpasis la vualan falon dum tiu rajdado, tie estis eksternorme vigla hommoviĝo. La pretigoj pro la iluminado hodiaŭ vespere okupis ĉiujn fortojn. Kiam mi faris ekzamenan vidon al la nove enterigitaj fostenoj, estis al mi, kvazaŭ la figuro hodiaŭ estis ne negrave pli klinite ol antaŭe, kaj kvazaŭ ankaŭ la skafaldoj estis kliniĝintaj. Sed mi diris nenion.

Alveninte ĉe la manĝejo, ni trovis la Koretinjon kun la inĝeniero. Ili fotografis. La du Enters:oj kunestis. Ili estis, kiel mi eksciis poste, manĝintaj en la manĝejo, kaj estis elvenintaj pro spekti. Ĝus kiam ni deĉevaliĝis ĉe ili, la „Nigger“ venis el la domo. Old Surehand kaj Apanatŝka tuj okupiĝis pri li. Ili faris nek enkondukojn nek longajn ceremoniojn.

„Ni estas venintaj pro aresti vin!“ diris Old Surehand. „Vi ĝus venas ĝustatempe al ni!“

„Ĉu aresti? Ĉu min?“ la „Nigger“ demandis. „Mi ŝate volus vidi tion, kiu sukcesus tion. Ĉu mi rajdas demandi kial?“

„Pro la teatraĵo, kiu devas esti ludata hodiaŭ vespere.“

La homo ektimiĝis, sed rapide reregis sin. Li eĉ ne faris la plej etan provon mal-konfesi. Li ekridis laŭte kaj vokis:

„Pro tio, ke mi volas forigi viajn malamikojn de vi, vi volas aresti min, ĉu? *Well!* Ĉu tio estas dankemo?“

„Ĉu vi kredas povi nin trompi?“ Apanatŝka demandis. Ni scias tre ekzakte, ke celas ne nur al niaj kontraŭuloj, sed ankaŭ al ni mem! Ne nur ili, sed ankaŭ ni estu buĉataj! Ni scias tion!“

„De kiu?“

La okuloj de la „Nigger“ brilis, kiam li faris tiun demandon. Apanatŝka respondis:

„Ĉu To-kaj-tŝun kaj Tusaga-sarits do ne estis ĉe vi hieraŭ vespere? Ĉu tiam ne estis sufiĉe klare parolata, kio devas okaziĝi? Ĉu ne ankaŭ la du Enters:oj kunsidis tie?“

Estis nepardonebla eraro, kiun Apanatŝka faris tie. La konsekvencoj sekvis tuj. La „Nigger“ igis sian manon en la poŝon, ĉiukaze al sia revolvero. Li alte rektiĝis sian figuron, vidis al unu post la alia el ni kaj diris, elpuŝante la vortojn kvazaŭ fajfe inter la dentoj:

„Do perfidite! Ĉio perfidite! Sed tio ne domaĝas! Kio estu, tamen estiĝu!“

La Koretinjo estis hastinta al mia flanko. Ŝi kredis min esti en danĝero. Ankaŭ la du Enters:oj estis proksimiĝintaj al ni. Ili staris nun ĝus flanke de la „Nigger“. Tiu vidis al ili per profunde malestimanta vido kaj pluis:

„Kaj ĉu vi scias, kiu estis elparolinta ĝin? Vi, vi, vi! Ĉar la du ĉefoj ja certe ne perfidus ilin mem! Fakte mi tuj devus pafi vin teren! Sed vi nur estas duavice! Unuavice estas tiu fremda, germana hundo kun sia *squaw*, kiujn mi tuj —“

Li ŝiris la revolveron el la poŝo, streĉis ĝin kaj direktigis ĝin al mi kaj mia edzino. Sed jen li estis ekprenita de la du Enters:oj, tiel ke li ne povis pafi. Ankaŭ Old Surehand

kaj Apanatŝka rapide elŝiris iliajn revolverojn. La Koretinjo stariĝis sin antaŭ min, pro servi al mi kiel ŝildo; mi sed ŝovis ŝin malantaŭ min kaj avertis ŝin:

„Neniun stultaĵon! Nenio okazos al ni!“

La „Nigger“ provis deskui la fratojn for de si. Ili ne lasis lin.

„Vi ne pafu al Old Shatterhand; pli bone pafu al mi!“ Hariman Enters vokis.

„Vi ne trafu tiun virinon; ne ŝin, sed min!“ Sebulon asertis.

Sukcesis al la „Nigger“ liberigi sian dekstran manon.

„Nu bone, nu bone!“ li vokegis. „Do unue vi du, proke mi liberiĝas de vi! Sed tiam des pli certa la aliajn du!“

Li direktigis la tubon de sia armilo fulmrapide al Sebulon kaj poste al Hariman. La pafoj krakis. Sed samtempe ankaŭ krakis du aliaj pafoj, fakte el la revolveroj de Apanatŝka kaj Old Surehand. La kugloj iĝis meze en la frunton de la gigantulo. Li turniĝis duone ĉirkaŭ si mem, komencis ŝanceli kaj tiam falis kune kun la du Enters-oj, kiuj estis trafitaj en la bruston, sur la teron. Apanatŝka kaj Old Surehand rapide ĵetiĝis sur lin pro sendanĝerigi liajn mortspasmojn. La Koretinjo ekgenuis malsupren ĉe Sebulon, kaj mi ĉe Hariman. Ambaŭ estis trafita nur tro bone. Hariman refoje malfermis la okulojn.

„Mi estis Via ‚Winnetou‘, ekde tiu vespero ĉe la Nugget-tsil“, li flustris. „Ĉu estas pardonata al mi?“

„Ĉio, ĉio!“ mi respondis.

„Ankaŭ al mia patro, ĉu?“

„Ankaŭ al li!“

„Tiukaze — mi ekmortas — feliĉe!“

Tiujn vortojn li nur spiretis plu. Tiam li mortis. Sebulon kuŝis senmove; sed liaj fermitaj palpebroj tremis. Ankaŭ li estis falinta en la manon de la morto. La Koretinjo ploris. Ŝi softe frotis liajn vangojn. Tiam li tute subite malfermis la okulojn, supreniĝis duone sur unu kubuton, vidis al ŝi kaj demandis per ŝajne tute sana voĉo:

„Vi ploras, *Mrs.* Burton, ĉu? Kaj mi estas tiel feliĉe!“

Li ridetis kaj tiris per la lasta forto ŝian manon al siaj lipoj.

„Legu la nomon sub mia Winnetou-stelo!“ li petis.

Ŝi kapjesis.

Post mallonga paŭzo li pluis per ĉiam mallaŭtiginta voĉo:

„Ĉu Vi kredas — ke mia patro — nun estas redemptata — redemptata?“

„Mi kredas tion“, ŝi respondis.

„Tiukaze — dank’ al Dio — ja tamen ne vanas — vanas!“

Li malleviĝis reen kaj streĉiĝis. Tiam ankaŭ li estis redemptita. Ni stariĝis. La giganta „Nigger“ kuŝis kun mortaj, sed rigide malfermitaj okuloj inter siaj oferoj.

„Ĉu tio devis esti?“ la Koretinjo demandis.

„Ne!“ mi respondis preskaŭ kolere.

„Jes, ne devis esti“ konsentis Old Surehand. „Ni povis eviti ĝin. Ni estis tro haste; ni estis nepripenseme!“

„Kiel tiel ofte, kiel tiel ofte, en eksa tempo“, mi konsentis, ĉar estis neeble al mi reteni mian riproĉon plene.

Ili akceptis ĝin senproteste.

„Kio nun estu?“ mi demandis. „Ĉu Vi nun kredas, ke Vi nebligis la konspiron de la morto de iliaj estroj? Aŭ ĉu ĵus tiu ekmorto erupcigos pli rapide tion, kion ni volas eviti?“

„Hm“, Old Surehand grumblis konsternite. „Ĝuste, ĝuste! Kio farendas?“

Ili vidis unu al la alia, sed ne trovis respondon al tiu demando.

„Kiel longe daŭras, ĝis deko da Viaj pohonim-komanĉoj estos tie ĉi ĉe tiu loko?“ mi scivolis.

„Kiam mi iras pro alvenigi ilin, maksimume kvaronan horon“, respondis Apanatŝka.

„Ankoraŭ scias nenio, kio okazigis tie ĉi. La laboristoj nun ne estas tie ĉi, sed en la ŝtonminejoj kaj ĉe la akvofalo. Venigu lojalajn homojn, kiuj intertempe forigu kaj kaŝas la ‚Nigger‘-on. Tiam oni aŭdos, ke li estus mortpafinta la du Enters:ojn dum kverelo kaj deigis de la puno per fuĝo. Tiel la laboristoj ne scios, kion ili devos pensi, kaj ekspektendas, ke ili kondutos trankvile.“

„Tio estas penso!“ Old Surehand konsentis. „Rapide for, kaj venigu la homojn!“

Tiu postulo celis al Apanatŝka, kiu tuj forgalopis kaj post malmulte pli ol dek minutoj alkondukis la komanĉojn, kiuj ligis la mortan ‚Nigger‘-on sur ĉevalon kaj forigis kun li. Du el ili restis kiel mortulgardistoj ĉe la mortpafitaj fratoj.

La Koretino estis profunde kortuŝita. Ŝi postulis iri hejmen. Tial mi rajdis kun ŝi al la kastelo, kiun ŝi forlasis nur je la posttagmezo, kiam ŝi estis trankviliginta, pro daŭrigi siajn fotografajn studadojn kun la pretema inĝeniero. Ŝi revenis hejmen nur ĉirkaŭ vespero pro anonci, ke oni jam komencis malsupre veni al la festoplaco ĉe la vuala falo. Post la manĝado ni iris malsupren kun la ‚Tenanto de la Granda Medicino‘ kaj la ‚Juna Aglo‘. Pappermann, Intŝu-inta kaj aliaj jam estis antaŭirintaj.

Tatela-sata estis priparolinta ĉion kun mi, kio necesis, kaj tiam doninta siajn ordonojn. La laboristoj devis resti ĉe la monumento. La ordinaraj spektantoj estis invititaj al la granda placo antaŭ la figuro, kiu havis spacon por miloj da homoj. Tiu placo reenlongis ĝis la du ‚Diablaj Katedroj‘, kiuj devis esti okupataj nur de la ĉefoj kaj subĉefoj. Inter la laboristoj kaj la spektantoj estis triobla vico da ‚Winnetou‘-oj, kiuj ĉiuj estis armitaj per revolveroj kaj devis prizorgi, ke la laboristoj tuj povis esti subigitaj, se eble ekideis al ili agi laŭ la plano de la ‚Nigger‘ kaj la aliancitaj kvar ĉefoj.

Menciendas, ke dum la daŭro de la hodiaŭa tago estis alvenintaj la unuaj vagonaroj, per kies helpo la tie ĉi ekspektata homamaso devis esti proviantataj per la trajno. Per tiuj vagonoj ankaŭ estis alvenintaj samtempe pluraj aroj da novaj Mount Winnetou:aj pilgrimantoj, kiuj eksciis kun plezuro, ke ili havus la feliĉon jam je la hodiaŭa vespero vidi la pompe lumigita figuron de ilia amata Winnetou. Ili nun ankaŭ jam tieis, kaj tiel okazigis, ke la spektantejo povis esti priskribita kiel ‚plenokupita‘. La ĉefoj, kiel jam menciita, estis disigintaj ĉirkaŭ kaj sur la ‚Diablaj Katedroj‘, fakte en jena maniero: Maldekstre de la veturvojo situis la katedroj 1 kaj 2, dekstre de ĝi situis la katedroj 3 kaj 4. Kiu estis sur katedro 1, tiu aŭdis, kio estis parolata sur katedro 3. Kiu troviĝis sur katedro 2, tiu komprenis ĉion, kio estis parolata sur katedro 4. Kaj tiel ankaŭ reciproke, la sono de 1 iĝis al 3, la sono de 2 iĝis al 4. Ĉar mi nun volis aŭdi ĉion, kio estis parolata

de al ni malamikecaj ĉefoj kaj iliaj anoj, mi estis lasinta konduki ilin al katedro 3, dum ni okupis la katedron 1. Ili certe ankaŭ aŭdis, kion parolis ni, sed ni sciis tion, kaj tial ni bezonis nur tion paroli laŭte, kion ili devis aŭdi, sed flustri mallaŭte ĉion alian. El la katedroj 2 kaj 4 nur la 4 estis okupita; la 2:n ni tenis malplene por ni.

Kiam ni atingis la festoplacon, ĝi nur estis unue ŝpare lumigita, fakte ne per oleo, sed ekskluzive elektre, ankaŭ la laternoj. Per la amaso de tie ĉi gajnata elektreco tio estis ege facile kaj komforte. Oni cedis antaŭ ni, tiel ke ni povis atingi nian katedron 1. Tiu estis la sama, de kies bazo la sekreta koridoro kondukis en la kavon. Tie ni estis akceptataj de la al ni amikaj ĉefoj. Ili ĉiuj estis tie, eĉ ankaŭ Avat-vila, la centjaraĝulo. Mi estis lasinta diri al ili, ke ili tute ne iru sur la katedron, sed intertempe restu je ĝia bazo. Ili estis farintaj tion sen scii la kaŭzo. Nun mi hastis sciigi ĝin al ili. Kiel ili ekmiris, kiam ili aŭdis, ke tio estis la klarigo de tiu malnova, mita sekreto! Mi diris al ili, ke ili nun grimpu sur la katedron, sed tie parolu nur mallaŭte kaj kun la manoj tenante antaŭ la buŝo; mi sed nun irus al niaj kontraŭuloj pro interparoli kun ili. Estus kompreneble tie ĉi ĉiu vorto.

Mi iris. La maljuna Kiktahan-ŝonka sidis kun sia anaro jam supre sur katedro 3. Tiu katedro estis ĉirkaŭe okupata de aro da armitaj ‚Winnetou:oj‘; tion mi estis ordonita tiel. Mi diris al ili, ke ili supozu ĉiun supresidanton esti kaptito kaj ne lasu iun el ili foriri sen mia permeso. Post tio mi suprengrimpis.

„Old Shatterhand!“ vokis la maljuna Tangua, kiu vidis kaj rekonis min unue.

„Jes, estas mi“, mi laŭte respondis. „Mi venas pro sciigi vin gravajon, pro ke vi ne atendas vane. Ĉu vi scias, ke la ‚Nigger‘, via alianculo, fuĝis?“

„Ni scias tion“, To-kaj-tŝun respondis. „Sed li ne estas nia alianculo.“

„Li estas!“ mi asertis. „Mi hieraŭ staris je la malfermita fenestro de la manĝejo, kiam vi kun li kaj la du Enters:oj preparolis la planon por la hodiaŭa vespero!“

„Uf, uf!“ li elvokis ektimigite.

Mi pluis:

„Nun la Enters:oj mortas, kaj ankaŭ li mortas. Old Surehand kaj Apanatŝka mortpafis lin!“

„Uf, uf! Uf, uf!“ ĉie ĉirkaŭe eksonis.

„Kaj Pida, kiu rajdis al la ‚Valo de la Kavoj‘ pro konduki la kvarmil suojn, jutojn, kajovojn kaj komanĉojn tra la kavoj al la akvofalo, ne venos pro ataki nin. Ni baris liajn vojojn kaj ekkaptos lin kune kun ĉiuj liaj militistoj!“

„Uf, uf!“

„Kaj via komitato estas malfondita! La fratoj Enters:oj portis al mi la skribaĵon, kiu estis subskribita de vi. Via tuta trompado kaj via malica intenco pri mia vivo estas konata! La puno sekvas! Vi estas kaptitaj! Tiu ĉi loko estas embuskata de niaj ‚Winnetou:oj‘. Ili fikstenu vin. Ajn ĉiu, kiu riskos fuĝi, estos sammomente mortpafata!“

Nun neniu plu respondis per elvoko. Ili estis ektimigita komplete. La kvar ‚sinjoroj de la komitato‘ ankaŭ troviĝis tie ĉi. Ankaŭ ili silentis. Neniu el ili diris unu vorton. Tiam estis, kvazaŭ la tero sub ni volis ŝanceliĝi. Mi sentis kaj aŭdis mallongan, sed akran tremon kaj grincon sub mi. Mi devis hasti foriĝi de tie ĉi.

„Ĉu vi aŭdas tion?“ mi demandis. „Tio estis la voĉo de la kavo, en kiu troviĝas viaj malfeliĉaj militistoj! Ili pereas!“

Post tiuj vortoj mi rapide grimpis de la katedro malsupren kaj hastis veni tien, kie mi devis esti. Ĉie ĉirkaŭe profunda silento regis. Ĉiu estis ektimigite, per ke la tero ŝanceliĝis. Tiam eksonis la laŭta voĉo de Old Surehand. Li ordonis, ke komenciĝu la lumigo. La inĝeniero obeis; li malfermis la projekciilon. La Winnetou-figuro estis enlumigita taghele, kaj ambaŭflanke de ĝi aperis sur la spegulo de la vuala falo la multe grandigitaj trajtoj de Young Surehand kaj Young Apanatŝka. Ĉu Old Surehand nu estis ekspektinta aplaŭdon? Ne okazis iu. Ĉiu restis kviete. La senkapa ŝtonfiguro kaŭzis eĉ ne la plej etan impreson, kaj la portretoj de la junaj artistoj enhavis malmulte da karakterecon en si kaj tiel malmulte da pli profunda senco, tiel ke ili lasis ĉiun restanta tute egalanime. Nun mi atingis mian katedron. Mi donis signon al la ĉeestantoj ja ne paroli laŭte, kaj mallaŭte demandis:

„Ĉu vi aŭdis ĉion?“

Ili kapjesis.

„Ankaŭ la tremon de la tero, ĉu?“

„Ankaŭ tion“, la Koretinjo respondis flustre kaj tenante la manon antaŭ la buŝo, pro deteni la aerondon de iri laŭ la vojo de la elipso.

„La katastrofo ŝajne ne volas atendi plu“, mi pluis. „Mi supozas, ke ĝi estas jen!“

Denove muĝis en la tero. Tiam estis, kvazaŭ ie io enfalis. Tiam la voĉo de Old Surehand eksonis duan fojon. La inĝeniero fermis la projekciilon kaj turnis la linean krankon. La bildoj malaperis; anstataŭ komencis lumi ĉiuj tieaj lumiloj, grandaj kaj malgrandaj, de la plej eta laterna lampo ĝis supre al la gigantaj globoj sur alte starigitaj fostenoj. Sed ankaŭ tio ne faris impreson. La lumo malvarmis, kaj la ŝtonbildo restis la sama. Oni estis vidinta ĝin dum la tago, kaj ne vidis ĝin nun alimaniere.

Sed tamen! Mi vidis ĝin alimaniere, mi! Mi vidis, ke ĝi estis kliniĝinta eĉ pli flanken, fakte tute eminente, tiel eminente, ke la Koretinjo timigite ekprenis mian manon kaj flustris al mi:

„Pro Dio! Ĝi falas, ĝi falas, la figuro!“

Kaj apenaŭ, ke tio estis dirita, ankaŭ ruliĝis sub ni; polvis kaj krakegis kaj puŝegis. La figuro kliniĝis maldekstren, ŝanceliĝis antaŭen kaj tiam kurbiĝis dekstren; tondro ruladis sub ni pretere — bruego, kvazaŭ la tuta mondo volis ruiniĝi —

„Fuĝu, fuĝu! Saviĝu!“ vokegis la laboristoj dum ili salte forhastis de la figuro.

Apenaŭ ke tio estis okazinta, estis nepriskribebla muĝego, pumpumego, krakego, bruego, krevego, smeŝego, batego kaj frakasego. La tero malfermiĝis. Abismo oscedis. La figuro turniĝis kune kun sia tuta, grandega bazo, malrapide ĉirkaŭ si mem kaj tiam malaperis kun batego, kvazaŭ niaj oreloj devis krevi, en la profundecon. Kaj ne nur la figuro, sed ankaŭ ĉio, kio estis en la proksimo, la skafaldoj, la fostenoj, la traboj, la stangoj kun la lumiloj, ĉio, ĉio estis kunŝirata malsupren. En la neksta momento estis plej profunda malheleco. Miloj da voĉoj unuiĝis al unu sola ega krio de teruro. Tiam estis sensona silento kelkajn sekundojn, el kiu eminentiĝis nur la despera voĉo de la maljuna Tangua:

„Pida, Pida! Mia filo, mia filo! Li pereis!“

Sed tiam relaŭtiĝis la mil voĉoj denove. Ili unuiĝis al bruego, mueĝego kaj kriego, kio sonis, kvazaŭ tiu tuta, granda amaso subite estis freneziga. Neniu volis resti sur sia sidloko. Ĉio urĝiĝis for, el la valo. La katastrofo ja povis ripetiĝi kaj vastiĝi. Ankaŭ niaj ĉefoj rapide estis grimpintaj de la katedro kaj plej haste interkonsilis, kio estis farenda aŭ lasenda. Nur tri estis restintaj supre, fakte Tatela-sata, la Koretinjo kaj mi. La maljuna medicinisto petis:

„Lasu neniun reveni supren! Nur ni tri volas aŭdi, kio estas parolata tie sur la alia katedro.“

„Ne ni tri, sed nur vi du“, mi respondis. „Nun mi ne havas tempon pro aŭskultado. Jen gravas savi, kio eble ankoraŭ saveblas!“

Mi sendis Intŝu-inta:n kaj Pappermann:on al la kastelo pro alporti torĉojn. Kaj mi iris al Old Surehand kaj la inĝeniero pro demandi, ĉu ne eblis rapide rekrei elektran lumon. Ili promesis fari tion; linedratoj kaj lumiloj sufiĉe tieis. Post tio mi ordonis al ses el la dek du apaĉaj ĉefoj rajdi tuj, malgraŭ la nokta malhelo, kun iliaj anoj al la Valo de la Kavoj kaj doni raporton laŭeble rapide, kiel statis tie. Kaj apenaŭ, ke mi estis farinta tion, proksimiĝis la danĝero en nova maniero. La akvofalo ne plu tute malaperis en la profundon. La malsuprenfalintaj teraj kaj ŝtonaj amasoj estis metiĝintaj en la elfluon, kaj tiel la akvo altiĝis en la kreiĝinta truego ĉiam kaj ĉiam pli. Nelonge plu, kaj ĝi devis subakvigi la valon, kaj tiam ne plu eblis savi la en la kavoj versajne ŝutkovrilojn de tie ĉi. Sed feliĉe ne okaziĝis tiel tute. La forto de la akvo estis pli granda ol la pezo de la teramasoj. La altiĝantaj akvamasoj, pri kiuj ŝajnis, kvazaŭ ili volis formi lagon, komencis muelumi, turni kaj gargari. Ili estis trovintaj novan vojon. Kreiĝis kvirlanta funelo, kiu malaperis kun la akvo en la profundon, kaj poste ne reaparis.

Nun venis Intŝu-inta kaj Pappermann de la kastelo. Ili alportis la deziritajn torĉojn. Kune kun la jam menciitaj ĉefoj mi kunprenis kelkajn prifidindajn Winnetou:ojn kaj grimpis kun ili, de aliaj nerimarkate, en la koridoron, kiu finiĝis sub la katedro. Ni bruligis la torĉojn ne jam ekstere, sed nur interne; tiam ni iris laŭ la malsupren kondukantaj ŝtupoj. Dum tio ni vidis, ke la tremado estis efikiĝinta ĝis tien ĉi. Estis falintaj ŝtonoj de la muroj kaj de la plafono de la koridoro, fakte des plie, ju pli antaŭen ni iĝis. Ofte tiuj estis tiel multaj, ke ni unue devis flankenigi ilin pro povi pluri. Tial ni antaŭeniĝis nur malrapide. Tie, kie nia koridoro iĝis en la alian, al la pasiflora ĉambro kondukanta, ĉio aspektis tre malbone. Al la stalaktitoj, kiujn ni estis amasigitaj, estis iĝinta amaso da alia ŝtonaroj, tiel ke ni bezonis preskaŭ horon pro liberigi la vojon al ni. De tie ni nun iĝis antaŭen al la loko, je kiu la malvasta vojo unuiĝis kun la vasta, do al la punkto, kie mi estis rimarkinta la unuan fendon en la plafono kaj la defaladon de la ŝtonoj. Ĝi estis ŝutkovrita, tute ŝutkovrita; ni ne povis atingi ĝin plene. Sed ni trovis du personojn, kiuj unu flanke de la alia sidis sur la tero kaj ne moviĝis, kiam ni proksimiĝis al ili. Estingiĝita, duona torĉo kuŝis flanke de ili. Estis la du fuĝintaj medicinistoj, kiuj estis marŝintaj je la pinto de niaj kvarmil kontraŭuloj tra la kavoj. Ili ne moviĝis kaj apenaŭ rekonis nin. La teruro kaj la travivinta mortotimo estis konfuzinta iliajn mensojn. Ili fiksigardis timoplene antaŭ ilin kaj estis nur malfacile paroligeblaj. Kostis al ni longa

tempo kaj granda peno kunmeti el iliaj konfuzaj respondoj, kio estis okazinta. Ili estis lasintaj la ĉevalojn gardite en la valo kaj piedire irintaj en la kavon. Ĉar ili havis sufiĉan tempon, ili antaŭeniĝis nur malrapide. Kiam la katastrofo okazis, ili troviĝis ĵus je la fino de la vasta rajdovojo, feliĉe ne en la mezopunkto, sed je la rando de la detruigejo. Estis aerpuŝo, kiu estingis ĉiujn torĉojn. La muroj tremis, la tero ŝanceliĝis, la plafono krakis. Multaj, multaj estis lezitaj de la defalintaj ŝtonaroj. Ekestis teruriga paniko. Oni ekfuĝis. Sed kien? Parto urĝiĝis antaŭen, la aliaj reen. Ĉiuj kriis kaj vokegis. Unu ŝiris la aliajn teren. Unu piedbatis kaj stamfis sur la alia.

Tiam la ŝtonfluo subite ĉesiĝis. Sed baldaŭ ĝi rekomenciĝis akve per des pli ega forto. Estis, kvazaŭ supre lago volis kreiĝi, kiu sed rapide kunkvirliĝis kaj malaperis. Tio kreis malsupre en la kavo gigantan fluŝutan ondon, kiu subakvigis ĉion kaj minacis kunŝiri ajn ĉiun, kiu ne trovis fiksan teniĝon. Tiu fluondo havis tian forton, ke ĝi kunportis pezajn rokaĵojn kaj metis tiujn malsupre je la finiĝo en tia amasaĵo, ke kreiĝis ne-trairebla baro, kiu nebligis al la ruĝuloj la fuĝon el la kavo reen en la liberan valon. La kavo do estis malsupre komplete ŝtopita, tiel ke apenaŭ la akvo povis elflui. Al la indianoj do restis nur la maniero saviĝi supren eksteren. Tiuj el ili, kiuj estis fuĝintaj reen, do returniĝis kaj urĝiĝis supren. Sed tie la vojo ja ankaŭ estis barita. La egaj amasoj, kiuj tie estis malsuprenfalitaj, lasis nur libere etan, malvastan malplenaĵon, kiu estis prizorge ekzamenenda, kiel for kaj kien ĝi kondukis. Tion komencis la du medicinistoj, al kiuj nur penis bruligi torĉon pro la malsekigitaj fajriloj. La malplenaĵo ŝajniĝis trapas-ebla; sed apenaŭ ke ĝi estis pasinta, kaj la du gvidoj volis reeniri pro sciigi iliajn anojn, estis denova, tondreca bruego; la tero tremis kaj la tuta ĉirkaŭo ŝajnis moviĝi kaj voli ruiniĝi. Tiuj du haste saltis, pro saviĝi, kun freneza teruro antaŭen, ĝis ili falis unu sur la alian kaj, ne plu regante iliajn pensojn, tute simple restis sidantaj, ĝis venis ni kaj trovis ilin.

Per tio klariĝis al mi, ke savado de la ŝutkovritoj nur eblis de supre, sed ne de tie, kie la kavo finiĝis malsupre en la valo. Gravis venigi laboristojn kun hakiloj, fosiloj, lumiloj kaj ĉiuj aliaj aĵoj, kiuj estis necesaj. Ni do devigis la medicinistojn, kiuj volis resti sidante, stariĝi kaj iri kun ni, kaj ni reeniris tra la koridoro en la liberon, al la Diabla Katedro, kie la inĝeniero kaj liaj subuloj intertempe estis sukcesinta krei novan, sufiĉan lumigon. La medicinistojn mi ekprenis, po ĉi- kaj aliaflanke, je la brakoj, kaj kondukis ilin al la katedro, kie kaptite sidis Tangua kune kun liaj alianculoj.

„Savita!“ li elvokis, kiam li ekkonis tiujn du. „Savitaj! Tiuj estas la gvidoj! Kiam ili el- iĝis vivante, do ankaŭ Pida, mia filo, ne mortas!“

Mi ne respondis, ŝovis ilin al li kaj foriĝis pro preparoli la savadon kun Old Surehand, al kiu uzebelis la laboristoj, kiuj necesis al ni. Tiuj homoj eĉ ne pensis pri esti indignitaj. Ili rapide pretis grimpi malsupren en la kavon kaj liberigi vojon tra la malsupren falintaj ŝtonamasoj. Jen nun la elektra lumo valoriĝis kiel ege utila. Ĝi povis lineata tre facile per la helpo de la ĉeestintaj dratoj en la koridoron, tiel ke la melhele brulantaj kaj fumantaj torĉoj estiĝis tute nebezonataj. La laborado komenciĝis. Gravis forigi tute pezaj ŝtonamasoj. Dum kiu tempo tio estis ebliga, tion oni ne povis diri; tio devis esti finatendanta. Tatela-sata ankaŭ foje kungrimis malsupren en la kavon pro rigardi tiun

laboradon. Sed alie li restis trankvile sur sia katedro, de kiu li povis supervidi kaj rigardi ĉion. Plej interesige al li estis, tute klare kompreni sur sia seĝo ajn ĉiun vorton, kiu estis parolata de la malamikecaj ĉefoj. Li estis aŭskultinta jam la tutan tempon kaj ankaŭ volis aŭskulti plu. Li ne nur eksciis ĉion, kio estis forsilentita, sed gajnis ankaŭ klaran komprenon de la efiko, kiun la katastrofo estis kaŭzinta en ĉiu unuopa el tiuj homoj.

La Koretinjo ekricevis multe da laboro. Ŝi devis pretiĝi kun Aŝta, Kolma-puŝi kaj siaj aliaj ruĝaj amikinoj pro la akcepto de la savitoj. Certe multaj estis lezitaĵoj. Oni devis eĉ ekspekti mortulojn. Ankaŭ malsato estis ĉesigenda. Pro tio estis multe pripensenda kaj multe farata. Tute ne daŭris longe, tiam ĉiuj ĉe la Mount Winnetou estantaj virinoj estis ege vigle okupataj. Ankaŭ ni viroj ne devis ripozi. Ni ja ne povis plirapidigi la savon de la endanĝerantoj, ĉar tiu okazis en certa, sekura maniero, sed gravis fari decidon pri la interna kaj ekstera sorto de kvarmil homoj, aranĝi ilian loĝadon kaj nutradon, kaj laŭeble ŝanĝi ilin el malamikoj en amikojn. Tiu ŝanĝado de malamikoj en amikojn cetere jam sufiĉe bone estis okazanta, ne nur malsupre ĉe la subuloj, sed ankaŭ multe pli supre ĉe la estruloj. Tion mi rimarkis je mia plezuro, kiam mi paŝis foje dum tiu nokto al Old Surehand kaj Apanatŝka, kiu staris interparolante kun iliaj filoj. Mia alveno unue ŝajnis konsterni ilin iomete; Old Surehand sed venkis tiun senton tre rapide kaj diris:

„Bone, ke Vi venas, *Mr. Shatterhand*, ĵus nun kiam ni estas momenton neĝenate inter ni. Ni ĵus estis interkonsilantaj, ĉu ni ŝuldas sinceran konfesion al Vi aŭ ne. Mi opinias, ke ni ŝuldas ĝin al Vi, kaj al la maljuna, bonega Tatela-sata, al kiu ni faris tiom da aflikto kaj ĉagreno. Ni pentas tion tree. Bonvolu, diru tion al li!“

„Jes, bonvolu, diru tion al li!“ Apanatŝka kuniĝis. „Ni ŝate pretas rebonigi tion. Tio pri la giganta monumento estis granda eraro de ni! Viaj legadoj efikis tre multe kaj profunde pro tio. Kaj kio tamen restis en ni de tiu eraro, tio estis forviŝata, kiam ni subite vidis nian verkon malaperi en la teron. Kaj ni konfesas nun, ni meritis tion! Certe estas amara kompreno. Niaj filoj pagas ĝin per bona parto de ilia artista memkonscio, kaj kio rilatas al ni, la patroj, nu ni elspezis sumojn por la afero, kiuj ne estis maleminentaj, kaj kiujn ni nun devas supozi esti perditaj —!“

„Ĉu perditaj?“ mi demandis. „Neniell!“

„Ho, sed jes!“

„Ne! Kaj ankaŭ la lezita artista memkonscio rapide estas resanigebla. Se tiuj du junaj sinjoroj tiutempe, kiam tiu plano kreiĝis en Vi, estus havintaj pli da fidon al mi, ilia delonga, sincera amiko, tiukaze Viaj pensoj estus direktiĝintaj sur tute aliajn vojojn, kaj Vi ne devus nun kalkuli pri perdoj, kiuj fakte ne estas perdoj, ĉar ili valoras al Vi kiel granda, interna gajno. Kaj tiu ne estas pagata tro multekoste!“

„Ĉu vere ne?“ Old Surehand demandis.

„Ne! Lasu la monumenton, kiel ni intencis ĝin, ĉiukaze esti venkinta tiun, kiel Vi intencis ĝin; la alia parto de la plano tamen restas.“

„Kiu parto?“

„La fondado de la urbo Winnetou.“

„Ĉu Vi ne pensas, ke ĝi nuligōs, nun, post ke ni estis defalintaj tiel per nia giganta figuro?“

„Certe ne! Mi tute kontraŭe estas la unua, kiu urĝas al tiu fondado per plej granda emfazo.“

„Se estus tiel!“ li ĝojigite elvokis, kaj „Se estus tiel!“ ankaŭ kunvokis la tri aliaj.

„Estas!“ mi certigis. „Kiam ni deziras, ke la animo de la ruĝa raso vekigu, ne sufiĉas zorgi sole nur pro ĝia menca estonteco, sed ni pretigu ankaŭ eksternan ejon, el kiu ĝi kapablos gajni la mondan forton. Tiu estu kaj estos la urbo Winnetou, kiun Vi planis, sen pensi pri la popolanimo, al kiu ĝi servu kiel loĝejo. Demandu Vin mem, kiajn strat-ojn, placojn, domojn, konstruaĵojn ni nun bezonas! Tribdomon por ĉiu unuopa ruĝa tribo! Hejmon por ĉiu unuopa klano, la plej grandan kaj plej belan por la nove fondita ,Klano Winnetou‘! Al kiom da monumentaĵoj sumos jam tio sole! Krome imagu la kastelon alte super la urbo, plukonstruita en digna maniero! Krome imagu, ke la ,Monto de la Reĝotomboj‘ malfermiĝos, kaj ke la trezoroj, kiun ĝi sendos al Vi, devos esti tenata en la maniero, kiun oni ŝuldas al tiuj nekompareblaj valoraĵoj! Tiuj estas nur kelkaj aĵoj, kion mi povas diri al Vi ĵus nun kaj intertempe. Ĉu Vi postulas pli?“

„Ne, ne!“ Old Surehand respondis. „Vi jen malkaŝas perspektivojn al ni, pri kiuj ni ĝis nun eĉ ne havis ideon! Kaj ĉi ĉion, ĉion estos priparolata, ĉu?“

„Jes.“

„Kaj ni rajtas ĉeesti, ĉu?“

„Memkompreneble!“

„Tiukaze ni dankas al Vi! Ni dankas!“ li elvokis tute entuziasme. „Tio ja estas pli ol ni iam povis esperi! Se ni nur estus pensintaj pri Vi pli ofte antaŭe!“

„Postfaru la ellasitan; ankoraŭ estas tempo pro tio!“ mi konsilis al li. „Pri la planoj, kiujn mi nun indikis al Vi, Viaj filoj povos laboradi artiste tute alimaniere kiel pri la de malfeliĉo trafita figuro, pro kiu Vi vane malŝparis ĉiujn Viajn fortojn! Nun ne plu estas tempo; ni pluparolos pri tio!“

Ili estis entuziasmigite pri tio, kion ili estis aŭdintaj, kaj mi povis esti konvinkita, esti gajninta ilin per tio pro nia pli alta kaj pli ĝusta opinio.

Ĉirkaŭ mateno, ĵus kiam mi interparolis kun la ,Juna Aglo‘, venis mesaĝisto de la apaĉaj ĉefoj, kiujn ni estis senditaj al la ,Valo de la Kavo‘, kaj anoncis al ni, ke ili feliĉe estis alvenintaj tie kaj estis surprize subigitaj parton de la ĉevalgardistoj; la alian parton oni subigos post tagokomenciĝo. Tio estis iom nesufiĉe. En la eksaj militemaj tempoj certe neniu estus estinta troveble pro transdoni tian duonan mesaĝon. Mi ja ne supozis, ke necesis ofendi al la mesaĝisto per mallaŭdo, sed la ,Juna Aglo‘ ja vidis tion je mi, ke mi ne estis kontente. Li demandis, kiam ni reestis sole:

„Mi ŝate volas alporti pli bonan mesaĝon. Ĉu mi rajtas?“

„Mi dankas“, mi malakceptis. „Pro tiaj mesaĝaj rajdadoj tielas aliaj, kiuj alikaze ne estas bezonataj.“

„Ĉu mesaĝa rajdado? Mi ne volas rajdi!“

„Kion alian?“

„Flugi!“

„Ha! Ĉu vere?“ mi demandis surprizigite.

„Jes. Mi bezonas nur duonan horon pro esti tie.“

„Tio kompreneble estus tre utile; sed la danĝero!“
 „Estas neniu!“ li ridetis.
 „Sed kio, se jes! Ŝajnas vere tro riskeme al mi permesi tion!“
 „Do mi nur volas demandi: Ĉu estas malpermesita al mi?“
 „Ĉu malpermesita? Ne. Vi estas via propra estro!“
 „Mi dankas al vi! Kaj unu aĵon plu, ĉar ja estas pri lafluganta aglo: Vi promesis al mi en la ‚Domo de la Morto‘ doni la kvar medicinojn al mi, kiam mi demandas pri ili. Ĉu mi rajtas rememorigi vin pri tio?“
 „Jes. Ĉu vi volas havi ilin?“
 „Ĉu vi ankoraŭ bezonas ilin?“
 „Ne. Al mi ili estis farintaj ilian laboron.“
 „Al mi ne jam. Mi estu la viro, kiu realportas la medicinojn, kiujn vi forprenis de ni.“
 „Vi havu ilin!“
 „Ĵus nun, ĉu?“
 „Ĵus nun! Venu kun mi al mia loĝejo en la kastelo!“
 Ni iris supren, tuj, kvankam ankoraŭ malhelis. Tie mi prenis la medicinojn kaj donis ilin al li. Li pendigis ilin ĉirkaŭ sia kolo.
 „Mi dankas al vi!“ li diris. „Ĉu mi povas doni ilin al la ĉefoj, kiam mi volas?“
 „Tute laŭ via plaĉo!“
 „Ĉu nur montri ilin al vi intertempe?“
 „Ankaŭ tion! Tiu via demando diras al mi, ke vi konas miajn intencojn kaj faros nenion, kio ne estus agorde al ili. Mi estas trankviligita.“
 „Do mi havas unu deziron plu. Vi vidu de mi, kiel facile kaj certe kaj nedanĝere laflugado estas, kiam oni havas la ĝustan aparaton. Bonvolu, akompanu min al mia turo!“
 Mi konsentis. Ni iris supren. Alveninte supre, mi restis ĉe la bazo de la turo. Mi sidigis sur benkon; li sed grimpis supren al la platformo. En la oriento softe komenciĝis krepuski. Nur malmultajn minutojn plu, tiam la heleta strio ankaŭ transiĝis ĝis la sudo. La sub ni situanta pejzaĝo videbliĝis kaj vekiĝante suprenvidis al ni. Tiam mi subite aŭdis mallaŭtan siblon super mi.
 „Nun! Mi venas!“ eksonis la voĉo de mia juna amiko de supre.
 Mi vidis supren. La birdo aperis. Li kvazaŭe faris salton, de la platformo de la turo eksteren en la aermaron. Ĝi svingis ĝiajn flugilojn kelkajn fojojn. Tiam ĝi komencis gliti, ŝvebi, supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren, tute kiel la ‚Juna Aglo‘ volis ĝin. Tiu sidis inter la du korpoj sur komforta seĝo kaj stiris sian aviadilon kiel certe irantan, ege obeeman ĉevalon. Li glitis kelkajn fojojn laŭ arkeca aŭ bukлека linio jen kaj reen antaŭ mi. Tiam li vokis al mi:
 „Nun mi elflugos al la foreco, al sudo, al la ‚Valo de la Kavo‘. Adiaŭ!“
 Li turniĝis al la indikita direkto, leviĝis pli supren kelkajn cent funtojn, kaj malproksimiĝis tiel rapide, ke ĝi malaperis de mia okulo jam post mallonga tempo kiel malgranda punkto. Tio igis min en tute strangan animstaton. Mi sentis min tiel fiere

kiel homo, sed tamen ankaŭ tiel malgrande, tiel ege malgrande! Estis en mi io kiel venko super ĉio ĝeneco kaj bazeco, sed ankaŭ samtempe kiel timo, ĉu la granda aĵo, kiun ni intencis fari, ankaŭ sukcesus. Tiam mi reeniris malsupren al la vuala falo, kie intertempe estis estiĝinta komplete hele, tiel ke la detruigo nun estis videble antaŭ ni. Ne estus utile priskribi ĝin. Ankaŭ pri la stranga, zorgoplena homa moviĝo kaj laborado je la malfeliĉejoj mi ne volas skribi. Aspektis ĥaose ĉirkaŭ la granda abismo, kiu estis disŝirita, kaj ankoraŭ ne tieis unu, kiu estus posedinta la senutilan kuraĝon riski iri ĝis ĝia rando pro povi vidi malsupren. Homoj venis kaj foriris. Ili ĉiuj estis kortuŝataj de la demando, kiam la unuaj savitoj nu aperus. Bedaŭrinde tio ne daŭris nur horojn. La koridoro, en kiu oni povis labori, estis tre malvasta; do ne multenombraj homoj povis efikigi ilian forton samtempe. Tial la savolaborado okaziĝis tiel malrapide, ke povis pasi pli ol plena tago, ĝis oni atingis la ŝutkovritojn. Intertempe eksonis trans la vasta placo la plendovoko de la maljuna Tangua:

„Pida, — mia filo — mia filo!“

Aŭ oni aŭdis unu el la ĉefoj plendi:

„Miaj komanĉoj! Miaj jutoj! Miaj suoj!“

Sed subite estis momento, kiam ĉiu vokis kaj kriis kaj ĉiu montris supren en la aeron:

„Birdo! Birdo! Giganta birdo!“

Tio estis ne tute plenajn du horojn, post ke la ‚Juna Aglo‘ estis forfluginta. Nun li revenis. Li sciis, kie li devis serĉi min. Li faris grandan arkon super ni, malvastigis ĝin iom post iom kaj venis en ŝraŭba linio malrapide kaj per frapa certeco malsupren al la tero. Li surteriĝis ekzakte inter la katedroj, meze sur la veturovojo.

„Estas la ‚Juna Aglo‘, la ‚Juna Aglo‘!“ ĉiuj vokis.

Ĉiu alurĝiĝis pro proksimiĝi al li. Sed tiam eksonis la forta voĉo de Atabaska:

„Reen! — Faru spacon! — Li estas la promesita ‚aglo‘, kiu flugas tri fojojn ĉirkaŭ la ‚Monto de la Sekretoj‘ kaj alportas la perditajn medicinojn al vi!“

Tiam la alirado ekĉesis. Oni miris. Oni fortentiĝis.

„La promesita aglo — tri fojojn ĉirkaŭ la ‚Monto de la Sekretoj‘ — alportas la medicinojn!“ tiel ĝi sonis ĉie kaj ĥaose.

Tatela-sata grimpis malsupren de sia katedro kaj paŝis al la brava fluginto; mi kun li.

„Vi flugas sen demandi min, ĉu?“ li mallaŭdis. Sed en lia maljuna, miraklamikeca vizaĝo brilis granda, fiera ĝojo, ĉar nun ja estis pruvita, ke la ‚Juna Aglo‘ kapablis flugi.

„Mi ne flugis pro vi aŭ pro mi“, tiu senkulpigis, „sed pro Old Shatterhand.“

„Kien?“

„Al la ‚Valo de la Kavoj‘.“

„Kiel statas tie?“

„La gardistoj de la ĉevaloj ĉiuj estas kaptitaj. Oni venigos ilin kune kun la ĉevaloj ankoraŭ hodiaŭ tien ĉi. La enirejo de la kavoj estas tiel barita per malsuprenfalintaj rokoj, ke neniuj homoj kapablas atingi la ŝutkovritojn de tie. Mi vidis tion mem. Ili povas esti savataj nur de tie ĉi supre. Kiam vi ordonos, Tatela-sata, ke mi flugu tri fojojn ĉirkaŭ la monto kaj serĉu la ŝosilon al la ‚Monto de la Reĝotomboj‘?“

„Hodiaŭ!“ la demandito respondis.

„Mi dankas al vi! Ĝi okazos ekzakte je la tagmezo, kiam la suno estos super niaj domoj. Sed mi ne iru tien sole. Ankaŭ alia kunestu, alikaze la aglo forflugos de mi, dum mi serĉas la ŝlosilon.“

Dum tiuj vortoj li vidis al ĉiuj el ni, ekvidis Vakon: on stari en sia proksimo kune kun aliaj ĉefoj kaj pluis, direktigante siajn vortojn al li:

„Flugi kun mi tien supren estas riskaĵo, kiun mi povas postuli de neniŭ, kiu ne ofertas ĝin al mi libervole. Aŝta, via filino, petis min kunpreni sin tien supren. Ĉu vi permesas tion?“

Vakon rigardis lian vizaĝon per longa, tre serioza vido kaj respondis:

„Vi riskemas! Ĉu vi scias, kion vi postulas de mi?“

„Jes“, la „Juna Aglo“ respondis same serioze.

„Ĉu vi konas la konsekvencojn al vi kaj ŝi, kiam ŝi akompaniĝos dum tiu flugado?“

„Ili estas konataj al mi. Aŝta estiĝu mia edzino!“

„Kaj ĉu vi konas ŝian valoron? Ĉu vi konas la valoron de la dono, kiun vi postulas?“

La „Juna Aglo“ ete kunigis la brovojn kaj respondis:

„Ĉu mi dezirus tiun donon, se mi ne kapablus taksi la valoron? Ĉu mi malpli valoras ol ŝi?“

Tiam aperetis rideto sur la bela vizaĝo de Vakon, kaj li decidis per laŭta voĉo, tiel ke ĉiuj aŭdis ĝin:

„Vi estas la unua „Winnetou“, kaj vi instruos la flugadon al via popolo. Vi estos granda, fama ĉefo. Mi permesas, ke mia infano akompanas vin supren al la ĉielo!“

Laŭta ĝojkriado eksonis ĉie ĉirkaŭe. La „Juna Aglo“ etendis la manon en la dratojn de sia aparato, lasis la flugilojn svingiĝi, grimpis iomete supren kaj vokis malsupren:

„Ni dankas al vi, ŝi kaj mi. Mi venigos ŝin al mi pro la flugado. Sed antaŭe mi devas interparoli iomete kun la ĉefoj, kiuj estas niaj kaptitoj.“

Li alteniĝis eĉ pli supren, flugis pro la mirigo de ĉiuj tri fojojn ĉirkaŭ la placo, tiam remalleviĝis per kurboj kaj atingis la teron ĵus antaŭ la katedro, sur kiu sidis Kiktahanŝonka kun siaj alianculoj. Li havis la kvar medicinojn, kiujn mi estis doninta al li, sur sia brusto. Ili tuj vidis ilin, kaj „To-kaj-tŝun“ vokis al li:

„Niaj medicinoj! — Eldonu ilin! — Aĵn kiu tenas ilin, estas ŝtelisto!“

„Jes, estas viaj medicinoj“, la „Juna Aglo“ respondis. „Ni ne ŝtelis ilin, sed ni nur tenadis ilin. Estos farata proceso pri vi, dum kiu videbliĝos, en kiu maniero ili estos neigataj kune kun vi. Old Shatterhand prenis ilin de vi. Li permesis al mi redoni ilin al vi. Sed nun, ke ni rekonis vin kiel mensogistojn, rabistojn kaj murdistojn, mi reprenos ilin kun mi!“

„Uf, uf! Uf, uf!“ ili vokis ektimigite kaj etendis la manojn al li.

Sed li ne atentiĝis pri tio. Li reflugis supren, denove ŝvebis tri fojojn ĉirkaŭ la placo kaj tiam malaperis malantaŭ la „Monto de la Medicinoj“, pro surteriĝi sur lian gardoturon.

Ĵus kaj ekzakte je la tagmezo li reaperis, kun Aŝta, sia fianĉino, flanke de si sur la seĝo. Miloĵ staris ĉirkaŭe kaj ekspektoplene rigardis malsupren al li. La koroj tremiĝis

pri la braveco de la juna, bela, riskema paro. Li flugis en vasta cirklo kaj trankvila, certa teniĝo, unue la postulitajn tri fojojn ĉirkaŭ la monto. Tiam li leviĝis krute kaj alten al la pinto, pro surteriĝi ĉe la bazo de la rokpinglo. Li mem restis sidante, pro teni la aparaton sub propra regado. Aŝta sed deĝis. Tion ni vidis malgraŭ la tre eminenta alteco. Ŝi malaperis. Post kelka tempo ŝi revenis kaj resuriĝis. La giganta birdo deĝis de la roko, ŝvebis de la monto, kaj en kurbaĵoj pli malsupren, ĉiam pli malsupren, denove flugis tri fojojn ĉirkaŭ nia placo kaj tiam ĵus ekzakte surteriĝis je la sama punkto de la veturostrato, kiel ĝi estis surteriĝinta jam fojon antaŭe. Ni estis en plej ega scivolo kaj hastis tien.

„Ĉu vi trovis la serĉatan?“ Tatela-sata demandis.

„Jes“, respondis la „Juna Aglo“. „La ŝtonon, kaj sub tiu tiujn du telerojn.“

Li donis ilin al nia maljuna amiko. Estis du malgrandaj, pratempaj, argilaj teleroj, kies randoj estis kungluitaj per tre malmola mastiko. Ni devis disrompi ilin pro la aĵon, kiu troviĝis inter ili. Tiu aĵo estis kunfaldita blankegriza tekstita peco, kun silkeca brilo. Post ke ni estis disfaldinta ĝin, ni vidis, ke estis mapo, desegnita per tre rezistanta, kolora fluaĵo. Apenaŭ, ke Tatela-sata estis farinta nur vidon al ĝi, li elvokis en la sono de plej ĝoja kontentiĝo:

„Estas ĝi! Estas ĝi, la ŝlosilo! Tiu estas la ekzakta vojo de la „Monto de la Medicinoj“ ĝis al la pinto de la „Monto de la Reĝotomboj! Ni venkis! Estas venko, senfine granda kaj senfina grava venko super la ombroj, kontraŭ kiuj la historio de la ruĝa raso estis batalinta ĝis nun! Heliĝos ĉirkaŭ ni, hele, klare kaj varme! Ni faros jam morgaŭ aŭ postmorgaŭ esploran ekskursion al la alte situantaj reĝotomboj! Ĝi estu ĝoja ekde hodiaŭ! Ĝoja, espero kaj konfido por ĉiu, al kiu estas neceseco partopreni en la granda leviĝo al la altecoj de la homaro!“

Ekde nun estis malgraŭ la serioza situacio de la ŝutkovritoj ĝoja solena atmosfero ĉie ĉirkaŭ la Mount Winnetou. Ni ne volis resti plu ĉe la vuala falo, sed ni grimpis supren al la kastelo pro kompari la tiel feliĉe trovitan „ŝlosilon“ kun aliaj tieestantaj mapoj kaj studi la paseblecon de la vojo. Intertempe la Koretinjo estis okupiĝanta pri la inĝeniero kaj liaj fotografiaj iloj, ĝis ŝi venis ĉirkaŭ vespero kaj sciigis min, ke nun ĉio estis en ordo.

„Kiu aŭ kio estas en ordo?“ mi demandis.

„Nia Winnetou“, ŝi respondis, „ne la falita, ŝtona. Li aperos tiel bele kiel vi apenaŭ povas imagi, sur la spegulo de la vuala falo, je ambaŭ flankoj de li la karakterecaj portretoj de Mara Durimê kaj Tatela-sata. Sed mi aperigos tiujn bildojn nur tiam, kiam ni povos esti trankviligitaj pri la sorto de la ŝutkovritoj. Nia belega Winnetou ne signifu timon kaj zorgon, sed savon kaj feliĉon. Ĉu tio konvenas al vi?“

„Ĉio, kion vi faras en via favorata atmosfero, konvenas al mi. Ni vespermanĝu kaj tiam iru malsupren! Mi devas iri en la kavon pro kontroli kial nu ankoraŭ ne videblas sukceso.“

Tiam pli poste alveninte en la kavon mi vidis, ke estis laborinta per eksternorma fervoro; sed estis movenda tian grandan amason da ŝtonoj kaj tero, ke ankoraŭ ne estis antaŭscieble, kiam tio estus finigita. Pasis pluraj horoj plu. La ĉevaloj de la ŝutkovritoj

intertempe estis alvenintaj. Oni rimarkis tion sen granda ekscito. La ĝenerala atento estis direktita sole kaj nure al la saviglaborado. Kaj finfine venis la anonco, ke oni proksimiĝis al la serĉatoj, ke oni aŭdis ilian foran frapadon. Estis supozeble, ke almenaŭ unu horo plu estus pasonta, ĝis oni atingis la frapantojn, kaj tial mi alvokis ĉiujn amikecajn ĉefojn, pro interkonsili sub la estreco de Tatela-sata pri la sorto de niaj kaptitoj. Tiu interkonsilado okazigis sur nia katedro, ĉar ĝi devis esti aŭdata de tiuj, pri kies sorto ni decidiĝis. Mi donis la ordonon procesi laŭeble severe, kaj tial okazigis, ke la kunsidado estis farata tre serioze. La juĝo estis: Simon Bell kaj Edward Summer estu maldungataj el la komitato. William Evening kaj Antonius Paper estu forpelataj. Kiktahan-ŝonka, Tusaga-saritŝ, Tangua kaj To-kaj-tŝun estu ligataj al la torturofosto kaj torturataj ĝismorte; iliaj medicinoj estu forbrulataj. Iliaj subĉefoj estu mortpafataj. De iliaj kvarmil militistoj estu forprenataj la armilojn, la hararojn kaj la medicinojn, post tio ili povos kuri, ajn kien ili volos!

Tio havis rigidan sonon, sed celis nur al bona intenco. Ni ja ĉiuj sciis, ke neniu el ni vere deziris la efikigon de tiu juĝo. Ĉiuj priparolitaj estis kondukintaj tute silente transe sur iliaj katedroj, kvankam ili klare aŭdis ĉiun vorton de nia interkonsilado. Ni ne estis aŭdintaj unu soneton de ili. Sed nun, kiam la juĝo estis publikigita, estis ne plu subigebla ekscito ĉe ili, kaj bruego, kiu estis la plej bona pruvo al ni, kiel serioze ili pensis pri ni kaj niajn paroladojn. Sole nur Tangua ne partoprenis en tiu bruo. Li ankaŭ nun ne lasis aŭdi ion alian kiel lian plendan: „Pida, mia filo!“ Li verŝajne treege amis tiun filon. Li estis la plej estiminda inter ĉiuj, kiujn ni ĵus kondamnis; jes, li eĉ komencis simpatiĝi al mi. Cetere ni kondukis tiel, kvazaŭ ni tute ne povis aŭdi la bruegon tie transe.

Kaj nun venis la anonco el la kavo, ke la ŝutkovritoj estis atingitaj, kaj ke ilia estro Pida deziris paroli kun Old Shatterhand. Mi donis la ordonon elvenigi lin al mi, sed sole nur lin, ĉar ili ĉiuj estu supozataj esti niaj kaptitoj. Ne daŭris longe, tiam li venis, sen armiloj; oni estis deprenintaj ilin de li. Mi etendis la manon al li kaj diris:

„Pida estas mia kaptito, sed mia amiko. Li ne fuĝos de ni, ĉu?“

„Ne!“ li respondis fiere.

„Li iru al sia patro, pro interkonsili kun li. Tiam li revenu al mi! Ju pli rapide li faras tion, des pli rapide liaj malfeliĉaj militistoj estos liberigataj el la kavo!“

Mi kundonis gvidanton al li. Li foriris. Kiam li estis alveninta transe, ni aŭdis ĉiun vorton, kio estis interparolata. Tiam li revenis. Mi kondukis, kvazaŭ ni tute ne estis aŭdintaj kaj sciantaj ion, kaj demandis lin:

„Kion Pida raportu?“

„La ĉefoj deziras debati kun vi.“

„Pri kio?“

„Pri ilia sorto.“

„Ĉu ili konas ĝin?“

„Jes.“

„De kiu? — Kiu sciigis ĝin al ili?“

„Neniu. Ili aŭdis ĝin. Vi interkonsiladis. Ili komprenis ĉiun corton. Okazas mirakloj tie ĉi ĉe la Mount Winnetou!“

„Jes, tie ĉi okazas mirakloj!“ mi konsentis. „Kaj la plej granda el tiuj mirakloj estas, ke ni intencas lasi regi indulgon. Sed nur rilate al viaj militistoj! Ni volas lasi iliajn medicinajn al ili. Sed iliajn armilojn ili demetu en la kavon. Ili rajtas veni unuope, unu post la alia. La malsatoj estos manĝigataj, la soifantoj trinkigataj kaj la lezitoj bandaĝataj. Se Pida donos sian promeson al ni kiel garantion, ke ĉiuj tiuj militistoj kondutos dankeme kaj paceme, eĉ eblos, ke ni kompotos eĉ pri la ĉefoj!“

„Mi donas tiun promeson al vi. Sed tiukaze mi devas iri fojon plu en la kavon pro diri al tiuj viroj, kiel ili konduku!“

„Do venu kaj baldaŭ revenu!“

Li volis foriri, sed pripensis kaj diris per iom pli varmuma sono:

„Tangua, mia patro aŭdis de mi, ke vi supozas vin mem eĉ ankoraŭ nun esti mia amiko. Li ordonetis al mi diri dankon al vi pro tio. Li amas min. Lia timo pri mi grandis!“

Nun li foriĝis. La Koretinjo ĝis nun estis estinta ĉe siaj amikinoj, kiuj tenis ilin prete kun iliaj anaroj pro akcepti la el la kavon lasantojn kun mangaĵo, trinkaĵo kaj bandaĝaĵoj. Nun ŝi venis al mi pro demandi min, kiam la unua savito aperus.

„Tiu jam estis tie ĉi!“ mi respondis. „Fakte Pida. Li reeniris en la kavon, sed tuj revenos. Kaj tiam ili venos ĉiuj, unu post la alia.“

„Do estas plej urĝa tempo! Mi devas hasti! Mi iru al la inĝeniero! Nun kiam la savitoj venas, ankaŭ aperu nia Winnetou!“

Ŝi rapide foriĝis. Ĝis nun estis lumintaj nur malmultaj lumetoj, tiel ke tute ne eblis esti parolata pri enlumigo de la tuta, granda, per homoj plenamasigita placo. Nun Pida revenis, kaj ĵus kiam li denove staris ĉe mi, la inĝeniero malfermis sian aparaton, kaj tuj aperis sur la grandioza, malsuprenfalanta akvosupraĵo nia al la ĉielo strebanta Winnetou, kun flirtaj haroj kaj al la tero reeniginta ĉefplumo. Per la malsupreniginta moviĝo de la akvo ŝajnis, kvazaŭ tiu figuro vere moviĝis supren, kio faris impreson, kiu tute ne estas priskribebla.

„Tio estas Winnetou! Mia Winnetou! Nia Winnetou!“ Tatela-sata elvokis trans la en tiu momento morte silente, apenaŭ spiranta homamaso.

Kaj tiam oni aŭdis la plensonan fore sonantan voĉon de Vakon:

„Jes, tio estas Winnetou! Tio estas lia animo!“

Kaj nun ankaŭ la ĝenerala surpriziĝo, la miro, la admiro dissolviĝis en mil laŭtajn, entuziasmajn ĝojvokojn, ĝis eksonis la forta, konvinkita sono de la giganta Intŝu-inta:

„Tatela-sata! Nia Tatela-sata!“

Tio estis pri la kapo, kiun oni ekvidis je la dekstra flanko de Winnetou.

„Tatela-sata! Nia Tatela-sata!“ la amaso ĝojvokis.

„La alia kapo estas Marimê, la reĝino de la fabelo, la amikino de ĉiuj niaj prauloj!“

Estis la „Juna Aglo“, kiu vokis tion.

„Marimê! La reĝino! La amikino!“ ĉiu buŝo ripete eldiris.

Sorĉo sen komparo por la okulo kaj la koro, tiel la vuala falo estis antaŭ ni! Neniu pensis en tiu ĉi momento pri la hieraŭ falinta figuro. Neniu atentigis pri la oscedanta abismo, en kiun la planoj kaj esperoj de niaj kontraŭuloj estis malaperintaj. La okuloj

kaj la pensoj de ĉiuj mensoj estis fascinitaj nur per tiu kvazaŭ vivante ŝajna bildo, de kiu neniu vido ŝajnis povi deĝi. Kaj tiam venis la unuaj savitoj el la elirejo de la subtera koridiro. Ili ekstaris, fascinite per la brila alvido, kiu doniĝis nun al ili post tiu longa kaj profunda malheleco. Sed antaŭen, antaŭen! Ĉar malantaŭ ili venis aliaj, kiuj same ravigite ekstaris, sed tamen devis plui. Niaj Winnetou:oj faris du vicojn dekstre kaj maldekstre, tra kiuj ĉiuj de la morto savitoj estis kondukataj al la al ili difinitaj partoj de la valo, kie ili trovis intertempan loĝejon kaj nutron. Tio daŭris horlonge. Ĝi estis komenciĝinta ĉirkaŭ je noktomezo kaj finiĝis nur ĉirkaŭ mateno, kiam la tago komencis krepuski.

Intertempe Pida ne estis estinta senagante. Li preskaŭ senĉese estis irinta jen kaj reen inter mi, la komisiisto de nia partio, kaj Tangua, la parolanto de la alia partio, kaj estis ĉiel klopodinta laŭeble mildigi la pri la ĉefoj faritan juĝon. Ni vidis tion tre ŝate, sed kondukis, kvazaŭ tiuj novaj disputoj tute ne gravis al ni. Tial mi rezignis unue nur pri niaj decidiĝoj rilate al la ordinaraj militistoj. Ili devis esti liberaj, tute liberaj, teni iliajn ĉevalojn kaj medicinojn kaj foriri, ajn kiam ili volis. Kiam ili aŭdis tion, estis egaj ĝojvokoj inter ili. Ilia situacio iĝis tiel, laŭ la cirkonstancoj, tiel avantaĝe, kiel ili ne estis povintaj antaŭsenti tion antaŭ kelkaj horoj. Malgraŭ la danĝereco de la katastrofo estis ne unu mortulo. La lezaĵoj, kiuj plej ofte estis kontuzoj, ja estis dolorigaj, sed ne danĝeraj. Ili estis bandaĝataj de la virinoj, kaj la sinjoro pacientoj treege bonfartis per la al ili decidita prizorgado. Ili trovis ĝin tute agrable, nun esti la amikoj de tiuj, kiujn ili ankoraŭ hieraŭ volis neigi. Ili vidis la stelojn, kiujn iliaj bonfarantoj kaj bonfarantinoj surhavis. Ili demandis pri la senco, pri la signifo de tiuj steloj. Oni klarigis ĝin al ili, oni montris al la belega figuro de nia Winnetou. Oni diris al ili, ke nun ne plu temis pri la starigo de morta, ŝtona bildo, sed pri la kreado de granda, nobla, vivanta Winnetou-korpo, pri trans tuta Ameriko kaj eĉ plu disvastiĝanta „Klano Winnetou“, kiu postulis de siaj membroj nenion pli, ol esti noblaj homoj, kiuj nur donas amon, ĉar nur tiu sole nobligas la homon. Baldaŭ oni aŭdis eksoni la instruantan voĉon de la „Juna Aglo“. Li estis „la unua Winnetou“, kaj aliĝis nun al ili pro rakonti kaj prediki al ili, kio estis al ili, ne nur en ilia nuna situacio, taŭge kaj sanige. Je aliaj vokoj oni aŭdis la voĉojn de aliaj „Winnetou:oj“. Ili eliris, pro uzi biblian esprimon, „kapti homojn“.

Kiam Pida vidis tion, li ĝojis kaj diris:

„Estas belega semo, kiun Old Shatterhand metis en la koron de sia frato Winnetou. Tiu semo havis delikatajn fruktojn. La floroj bonodoras plu kaj plu. Ne daŭros horojn, sed nur minutojn plu, tiam ĉiuj tiuj malamikoj postulos esti membrigata en la „Klanon Winnetou“. Ĉu tiu peto estus plenuminda al ili?“

„Certe! Tre ŝate!“ mi respondis.

„Ĉu ankaŭ al mi?“

„Ankaŭ al vi!“

„Ĉu ankaŭ al ni?“

Dum tio li montris al la kontraŭula katedro. Mi respondis ridete:

„Mia frato Pida estas tre, tre saĝa agento. Kiam mi diras la verecon, ke ankaŭ la kaptitaj ĉefoj povas esti membrigitaj en la klano, mi liberigu ilin kaj pardoni ĉion al ili!“

„Se vi faras tion, vi estas vera ‚Winnetou‘, alikaze ne! Ĉu vi permesas al mi iri al mia patro?“

„Iru!“ mi diris, sed nur post iom da tempo. „Sed baldaŭ revenu.“ Kiam li estis veninta al siaj anoj, ni tie ĉi denove aŭdis, kion li diris tie transe. Li ankaŭ tie estis bona agento. La en la kavo eltenita timo, la plena akcepto de nia flanko, la nekomparebla impresado de la hodiaŭa lumigo kaj de nia belega Winnetou-figuro, ĉi ĉio efikiĝis kune pro helpi al la juna kajovajo atingi sian bonan celon. Li revenis al mi kaj anoncis:

„Tangua, mia patro, la ĉefo de la kajovajoj venis al vi, sed li ne kapablas iri. Li volas peti vian pardonon, volas interparoli kun vi!“

„Li restu!“ mi ĝoje respondis. „Mi iras al li. Mi petas vin konduki min al li!“

Antaŭ ke mi foriĝis kun li, mi petis la ĉefojn resti sidante tie pro aŭskultadi, kaj, se mi petus pri tio de transe tien ĉi, respondi. Je la bazo de nia katedro ĵus tiam aperis la ‚Juna Aglo‘ pro fari iun demandon al mi. Mi tute ne lasis lin komenci, sed diris:

„La ĉefoj tuj ricevu iliajn medicinojn. Kiel longe daŭras, ĝis vi povas alporti ilin?“

„Per la birdo, ĉu?“ li demandis.

„Se eblas, jes.“

„Duonan horon.“

„Tio konvenas al mi. Tiam, ekzakte kiel hieraŭ, krepuskos. Tio estas la ĝusta tempo. Bonvolu, iru tuj!“

Kiam mi alvenis transe kun Pida, lia edzino kun sia fratino staris ĉe la katedro. Ni grimpis supren. Pida sidiĝis sur la teron ĉe la ĉefoj, sed mi restis starante. Tangua ekparolis. Li diris, ke li ŝate volus stariĝi pro paroli kun mi, sed li bedaŭrinde ne povis leviĝi. Mi ne lasis lin paroli plu, sed interrompis lian paroladon. Mi diris, ke se estus priparolata pardono tie ĉi, tiukaze certe estus plej ofte devigita ne la indiano, sed plej ofte la palvizaĝo, kaj ke tiu palvizaĝo estis mi. Post tio mi rememorigis la estintecon kaj rakontis, kiel la palvizaĝo venis trans la maro pro rabi de sia ‚ruĝa frato‘ liajn medicinojn. Post tio mi rakontis laŭ la historio. Mi troigis nenion kaj kaŝumis nenion. Mi rakontis la verecon, nudan kaj senŝminkan, kiel ĝi vere, vere estis. Mi parolis pri la eraroj de la ruĝa raso, pri ĝiaj virtoj, pri ĝiaj penoj, antaŭ ĉio pri ilia ĝisnuna senestonteco. Ĉi ĉion oni ĉefe ŝuldaĉis al la palvizaĝo. Sed tiu palvizaĝo estus havinta pli bonan komprenon. Li dezirus, ke sia ruĝa frato restu vivante kaj estiĝu popolo, kie estis difinita al li dekomence. Tiu palvizaĝo pretus konfesi ĉiujn siajn erarojn kaj rebonigi ilin. Li sentus antaŭ ĉio, ke li estus devigata purigi sian koron kaj sian konscion, petante sian ruĝan fraton pri pardono.

Dirante tion, mi paŝis al ili kaj etendis miajn manojn, pro oferti ĝin kiel pardonpeton. Kelkajn minutojn ĉiuj silentis; sed tiam estis etendataj ĉiuj manoj al mi, kaj ĉiu tribo certigis al mi, ke ili estis same pekintaj kaj devis same pri pardono kiel mi, la palvizaĝoj.

„Pardoni unu la alian! Vi nin kaj ni vin!“ Tangua vokis. „Kaj tiam helpi unu al la alia! Mi malamamis vin, sed nun mi amas vin! Kiam mi ekmortos, estu kvieto super mia tombo! Ĉu ni ankoraŭ estas viaj kaptitoj?“

„Ne!“ eksonis la voĉo de Tatela-sata, jam antaŭ ke mi povis respondi.

„Uf!“ Kiktahan-ŝonka vokis. „Kiu parolas tie?“

„La ‚Tenanto de la Granda Medicino‘.“

„Kie?“

„Transe sur la Diabla Katedro.“

„Do ni estas tie ĉi ankaŭ sur katedro?“

„Jes. Mi kaŝaŭskultis vin sur la norda diabla katedro, kiun oni nomas la ‚Orelo de la Diablo‘. Tie aŭdas la malicaj homoj, kion diras la bonuloj, kaj tiam estas savataj. La ĉefo Tangua demandis, ĉu vi estas ankoraŭ kaptataj. Li demandu plu!“

Li ne atendis duan postulon, sed faris tion tuj:

„Ĉu ni staros je la torturofosto?“

„Ne.“

„Ĉu ni tenas niajn armilojn kaj ĉevalojn?“

„Jes.“

„Ĉi ĉiuj viaj ĉefoj konsentas?“

„Ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj!“ eksonis tiom da voĉoj, kiel ĉefoj nun troviĝis ĉe Tatela-sata.

„Kaj kio estas pri niaj medicinoj?“

„Vidu supren al la ĉielo! — Kiun vi vidas tie?“

Nun krepuskis tiel, ke la inĝeniero fermis la aparaton. Winnetou malaperis de la vuala falo. Sed anstataŭ aperis alte supre la ‚Juna Aglo‘, levis sin pli kaj pli malsupren, flugis tri fojojn ĉirkaŭ la placo kaj tiam surteriĝis tiel, ke li tuŝis la teron ekzakte antaŭ la katedro, sur kiu mi troviĝis. Tie li deĝis, venis supren kaj diris:

„Old Shatterhand redonis per mi viajn medicinojn al vi. Vi do liberas!“

Kiel haste ili ekprenis, pro pendigi ilin! Ili laŭte ĝojkriis, kaj tiu ĝojkriado vastiĝis ĉiam kaj ĉiam plu. Sed meze dum tio Tatela-sata vokis transen al ili:

„Vi estas niaj amikoj! Morgaŭ estos formata nova komitato, kiu interkonsiladu pri la ‚Klano Winnetou‘. Kaj postmorgaŭ ĉiuj ĉefoj kaj subĉefoj rajdos al la ‚Monto de la Reĝotomboj‘, pro serĉi la historion de nia estinteco. *Hongh!*“

Per tiu mesaĝo la ĝojkriado estis duobligata. La ‚Juna Aglo‘ flugis reen al sia turo. Mi sed decidis fari rondan promenadon tra la valo kaj ĉiuj la diversaj grupoj, kiuj estis formiĝintaj tie. Ni venis tie ĝis supren al la manĝejo, en kies proksimo ankoraŭ kuŝis la fratoj Enters, prizorge kovritaj kaj gardataj de du komanĉoj. Neniu estis havinta tempon okupiĝi pri ili. Sed nun estis nia devo aranĝi ilian enterigon en serioza, homama maniero. Ni plenumis ilian lastan volon: ni serĉis la nomojn en iliaj Winnetou-steloj. Hariman estis skribinta mian nomon, Sebulon la nomon de mia edzino. Tiel ili, kiuj unue intencis neigi nin, per interna ŝanĝo estiĝis niajn gardantojn kaj iris en la morton pro ni!